



# Boletín

*n° 413 Enero - Marzo 2016*



*Asociación de utilidad pública*

# Boletín

Bulteno de Hispana Esperanto-Federacio  
aperanta de 1949  
Numero 413

Redakto-skipo  
Direktado kaj kompostado: Ángel Arquillos L.  
Revizio: Alejandro Pareja / J. A. del Barrio

Retadreso de la bulteno:  
bulteno@esperanto.es

\*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la respektivaj aŭtoroj

\* La redakcio rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn

\*Republikado de enhavo nur permesita kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro

## Hispana Esperanto-Federacio *Federación Española de Esperanto*

Rodríguez San Pedro, 13, 3º, 7  
ES-28015 Madrid  
admin@esperanto.es  
Bankokonto BBVA: ES85 0182 1252 31  
0204011961  
TRIODOS BANK: ES24 1491 0001 2420 0926  
4025  
Poŝtelefono: +34 638 547 104  
Telefono: +34 914 468 079 (bv. lasi mesaĝon  
en la aŭtomata respondilo)

### Estraro

**Prezidanto:** José Antonio del Barrio  
**Vicprezidanto:** Ángel Arquillos López  
**Sekretario:** Félix M. Jiménez  
**Vicsekretario** Águeda Biurrun  
**Kasisto.** Raúl Mtnez. Anguita  
**Voĉdonantoj:** Eduardo Berdor  
Juan José Vera  
Alejandro Escobedo

Presejo: Gráficas Notivol (Zaragoza)  
DL: M-39811-2012 / ISSN 2444-8397

# Salutvortoj

Kongresi ĉe malgranda vilaĝo estas vera aventuro, kaj tio estas la celo de HEF ĉi-jare, ĉar la internacia lingvo estas ĉies propraj kaj en la vilaĝo Herrera del Duque loĝas esperantistoj, do, ni profitos la okazon kunvivi kun la naturo kaj samtempe inter vilaĝanoj, kiuj ĝuos nian feston kaj mi certas ke multaj el ili interesiĝos pri Esperanto, kial ne? Pere de la diversaj muzik-grupoj kaj aktoroj, kiuj partoprenos la eventon, mi certas ke la vilaĝo fariĝos scenejo plena je homoj kun simila pensmaniero kaj kun la celo krei frantan internacian etoson. La gastronomio estas tre bongusta kaj varia, la ĉefaj produktoj estas ĉaso, fiŝo kaj verdaĵoj. La loka brutaro ofertas altkvalitan viandon. La kukaĵo-farado ofertas ankaŭ produktojn faritajn kun mielo, ovoj kaj porka graso, interalie.

Tipaj pladoj estas: “Escarapuche de Peluche” kuirita kun viando, tomato kaj cepo, ĝi estas la plej tipa plado. “Migas”(panmolaĵo kun ruĝa kolbaso, ajloj, lardo), “Gazpacho” nomata malvarma supo, tre bongusta en somero; la omleto el sovaĝaj asparagoj, supo el tomato kaj diversaj salatoj.

La kukaĵo-farado esta fama pro la bongustaj “Chaquetias”, prononcu Ĉaketias. La 1a aŭ 2a de novembro oni kutimas manĝi sekigitajn fruktojn kiel: figojn, nuksojn, kaŝtanojn, glanojn, granatojn kaj aliajn kiel cidonimarmeladon kaj ankaŭ tapajn platkukojn kaj specialajn panojn.

La metiistaro ankaŭ estas menciinda: mebloj, forĵado, objektoj el ŝtono, marmoro, bestaj dentegoj, ledο, vimeno, tifao, ktp.

Se vi interesiĝas pri pliaj aferoj, ĉefe la historio de la vilaĝo kaj pluraj kuriozaĵoj vi estas invitata ĉeesti la kongreson.

Ĝuu la legadon de ĉi nova bulteno plena je interesaj novaĵoj.

La Redakcio

# Enhavo

Salutvortoj	1
Ordinara Ĝenerala Kunveno	3
Asamblea General Extraordinaria/Eksterordinara Ĝenerala Kunveno	4
Gazetaro, Hazardaj aferoj en la amaskomunikiloj	5
Nova Zeo en Hispanio	6
Pri Grupoj kaj Asocioj	7
Partopreno en konferencio pri socia historio en Valenciao	11
Dokumentoj alvenintaj en la biblioteko 2015	12
Prezento de <i>Bohemiaj Lumoj</i> en Madrida Teatro	14
Programo de la 75a Hispana Kongreso de Esperanto	16
Amo Seminario en Ekstremaduro	17
Praktikaj informoj pri la Hispana Kongreso	18
Vizito al Herrera del Duque	19
La rolo de la volapukistoj...	21
Verne revizitata kaj remalkovrata	26
Eksteraj rilatoj de UEA...	27
Hispana aktiva poezio en Esperanto...	31

Ĉefpaĝo: Preĝejo S.Juan Bautista (Herrera del Duque) / Dorsopaĝo: Membriĝo aŭ renovigo al HEF por 2016

---

## LA ASOCIO URĜE BEZONAS KANDIDATOJN POR LA ESTRARO

Vi jam scias, ke ĉi-jare finas la mandato de la nuna Estraro de HEF (2012-2016), kaj sekve oni devas elekti novan estraranojn.

Ĉar neniun proponoj de kandidatoj oni ricevis antaŭ la ordinara ĝenerala kunveno de la pasinta 17a de aprilo, eksterordinare la nuna estraranoj akceptis la proponon de la ĉeestantoj en tiu kunveno kaj daŭrigos sian mandaton ĝis la kunveno de Herrera del Duque, la 3an de julio, sed ne plu.

Kelkaj de la nunaj estraranoj tute ne rekandidatiĝos, kaj nepre oni bezonas, ke iuj membroj de HEF kandidatiĝu.

Do, bonvolu, serioze pensu, kaj kandidatiĝu!

La Estraro de HEF

# PROKOKOLO DE LA ORDINARA ĜENERALA KUNVENO

La 17-an de aprilo 2016 je la 11:00 horo (dua alvoko) okazis la Ordinara Ĝenerala Kunveno en la sidejo de la asocio, strato Rodriguez San Pedro, 13, 3-7, Madrido. Ĉeestis la estraranoj: Eduardo Berdor (voĉdonanto), Félix Manuel Jiménez (Sekretario), Ángel Arquillos (vicprezidanto), Raúl Martínez (Kasisto), Águeda Biurrún (vic-sekretario) kaj José Antonio del Barrio (Prezidanto), kiu prezidis la kunvenon. Partoprenis ankaŭ 2 individuaj anoj kaj aliaj 2 anoj estis reprezentitaj. Ankaŭ partoprenis 4 kolektivaj membroj (Frateco el Zaragozo, Andaluza E-Unuiĝo, Esperanto Kastil-Manĉa Asocio kaj Madrida E-liceo) reprezentataj de kvar el la ĉeestantaj individuaj membroj, entute 14 partoprenantoj. La sesio disvolviĝis laŭ la jena tagordo:

## **1.- Legado kaj aprobo de la protokolo de la antaŭa kunveno (3 majo 2015)**

Oni aprobis unuanime la protokolon de la antaŭa kunveno.

## **2.- Aprobo de la kontoj kaj kas-stato de 2015.**

La kasisto rimarkas, ke la asocio havas profiton ĉi-jare, sed tiu profito estas pro iu donaco. Sen tiu donaco, la kontoj estus malprofitaj. Do, li konsilas por la venontaj jaroj malplialtigi elspezojn aŭ plialtigi enspezojn el la ordinaraĵoj projektoj ĉar ne estas bona havi profiton nur pro eksterordinaraj enspezoj. Rilate al la kas-stato, la Estraro konsilas deponi monon en UEA.

Post la ĉi-supraj klarigoj pri la kontoj far la Kasisto, la kontoj, prezentitaj en la Boletín n-ro 412, estis aprobitaj unuanime.

## **3.- Aprobo de la Raporto pri aktivaĵoj de 2015**

La raporto, prezentita en la Boletín n-ro 412, estis aprobita unuanime.

## **4.- Informo pri la anaro**

La estraro ne havas nun la necesajn datumojn por montri la informon, do, oni decidis lasi ĝin por la eksterordinara kunveno, kiu okazos dum la Hispana Kongreso 2016 en Herrera del Duque.

## **5.- Renovigo de la Estraro**

La mandato de la nuna Estraro (2012-2016) finiĝas, do estas deviga renovigi la estraranojn.

Ne alvenis proponoj de kandidatoj, do la partoprenantoj en la kunveno proponas al la nunaj estraranoj daŭrigi ilian mandaton ĝis la kunveno de la Hispana Kongreso (julio la 3an), kaj la estraranoj akceptas fari tion. Nepre devos esti elektata nova estraro dum la kunveno de julio. Oni faros fortan peton al la anaro por havi kandidatojn, ĉar kelkaj nunaj estraranoj certe ne daŭrigos sian postenon.

## **6.- Sugestoj kaj demandoj**

Ne estis sugestoj aŭ demandoj.

Sen pli da aferoj por pritrakti, finiĝas la kunveno je la 12:00 horo.

La Prezidanto

La Sekretario

José Antonio del Barrio Unquera

Félix Manuel Jiménez Lobo

# ASAMBLEA GENERAL EXTRAORDINARIA

El Presidente les invita a asistir a la Asamblea General Extraordinaria, que tendrá lugar el domingo 3 de julio de 2016, a las 9:30 horas (a las 10:00 en segunda convocatoria) en el Palacio de Cultura de Herrera del Duque (Cáceres), con el siguiente orden del día:

- 1.- Lectura y aprobación del acta de la anterior asamblea (17 de abril de 2016).
- 2.- Renovación de la Junta directiva.
- 3.- Informe de los socios.
- 4.- Proyectos 2016.
- 5.- Cuotas para el año 2017.
- 6.- Aprobación del Presupuesto para 2016.
- 7.- Ruegos y preguntas.

**IMPORTANTE:** Los miembros de la Federación que deseen ser representados por algún otro socio, deben enviar un mensaje indicando claramente el nombre completo del representante y representado, al buzón electrónico, [admin@esperanto.es](mailto:admin@esperanto.es) o bien por correo postal a las oficinas de la asociación, antes del 28 de junio.

El Presidente de HEF

José Antonio del Barrio Unquera

# EKSTERORDINARA ĜENERALA KUNVENO

La Prezidanto alvokas vin ĉeesti Eksterordinaran Ĝeneralan Kunvenon, kiu okazos la 3-an de julio de 2016 (dimanĉe), je la 9:30 horo (je la 10:00 horo dua alvoko), en la Palaco de Kulturo de Herrera del Duque (Cáceres), laŭ la jena tagordo:

- 1.- Legado kaj aprobo de la protokolo de la antaŭa kunveno (17 aprilo 2016).
- 2.- Renovigo de la Estraro.
- 3.- Informo pri la anaro.
- 4- Projektoj 2016.
- 5.- Kotizoj por la jaro 2017.
- 6.- Aprobo de la Buĝeto por 2016.
- 7.- Sugestoj kaj demandoj.

**GRAVA RIMARKO:** La membroj de HEF, kiuj deziras esti reprezentataj fare de iu alia membro, bonvolu transdoni mesaĝon informante pri tio, klare indikante la kompletan nomon kaj de la reprezentanto kaj de la reprezentato, al HEFa retpoŝta adreso [admin@esperanto.es](mailto:admin@esperanto.es), aŭ per ordinara poŝto al la oficejon de la asocio, antaŭ la 28a de junio.

La Prezidanto de HEF

José Antonio del Barrio Unquera

## GAZETARO

### HAZARDAJ APEROJ EN LA AMASKOMUNIKILOJ

Se vi provas sekvi la aperon de nia lingvo en la amaskomunikiloj de Hispanio aŭ de aliaj landoj en la hispana lingvo, vi ofte trovas surprizojn, hazardaĵojn, koincidojn.

Kelkafoje temas pri elekto de Esperanta nomo por iniciatoj, komercaj varoj aŭ asocioj. Ekzemple, ni trovis lastatempe la nomon "Blua" por sanasekuro, aŭ "Bovoj" (laŭ la informoj: "manada") por la nova kompanio de la konata familio de klaŭnoj Aragón, aŭ "Reciproka Subteno" (tiel!) por bonfara organizaĵo en insulo Gomera.

Sed en lastaj semajnoj Esperanto aperis plurfoje en komunikiloj pro du tre malsamaj okazoj.

La unua estas la omaĝo kiun la kompanio Google faris (per unu el tiuj bildoj aperantaj foje en la ĉefpaĝo de la serĉilo, nomataj "doodles") al Ángela Ruiz Robles, instruistino el Galegio, kiu en la 40aj kaj 50aj jaroj patentis tre interesan ilon, la Meĥanikan Enciklopedion, celantan plibonigi la librojn per iu mekanika sistemo kiu enhavus multajn informojn en unu kompakta skatolo. Tial ĝi estas tre ofte konsiderata kiel antaŭanto de la elektronika librolegilo (aŭ bitlibro). Ŝi inventis aliajn ilojn por instruado, kvankam bedaŭrinde ili ne sukcesis atingi komercajn interesitojn. Tamen la ideo konserviĝis, kaj la mekanika libro estas montrata en la Muzeo de Scienco kaj Tehnologio de Korunjo, kiel pionira ideo.



En tiu kunteksto, pluraj amaskomunikiloj menciis ke Ángela Ruiz estis esperantisto, kaj ke ŝi provis enkonduki Esperanton kiel alian faciliganton de la instruado. Ĉu iu el niaj legantoj havas informojn pri la esperantista vivo de Ángela Ruiz?

La dua informo estas pli polemika. Certe ĉiuj niaj legantoj en Hispanio konas la skandalon ĉirkaŭ la pupteatristoj (la "titiriteros", kiel famiĝis la polemiko) kiuj estis enkarcerigitaj en Madrido sekve al spektaklo, kiun iuj gepatroj protestis, kaj kiun la polico konsideris favoranta terorismen. Aliaj homoj konsideris ĉion troigita politika manipulado, kiu ne meritas ajnan leĝan punon.

En la lastaj semajnoj aperis novaj informoj, inter kiuj la plej frapa estas la fakto ke la tuta spektaklo disvolviĝis ne en la hispana, sed plejparte en Esperanto (krom iuj frazoj en la latina). Temis pri elekto de la pupteatristoj, kiuj deziris komuniki siajn ideojn ne per vortoj sed per la spektaklo mem. La uzo de Esperanto estas nun unu el la ĉefaj atutoj de la defendo de la pupteatristoj, kiuj celas montri ke la verko ne celis infanojn, kaj neniel celis defendi teroristajn agadojn.

La informo pri Esperanto aperis en diversaj komunikiloj, sed ne estis aparte reliefigita, kaj neniu el ili demandis la Federacion pri ĝi. Ni do preferis resti silentaj pri la tuta skandalo, por konservi la neŭtralan sintenon de la asocio. Ĉiukaze, ni memoru la ĉefan principon: Esperanton rajtas uzi iu ajn, sendepende de la celoj. Espereble tion komprenas ĉiu leganto kaj aŭskultanto de la polemika novaĵo.

## NOVA ZEO EN HISPANIO

Sendube vi scias kio estas ZEO. Temas pri stratoj, monumentoj, tabuloj aŭ aliaj memoraĵoj stari-gitaj honore al Zamenhof aŭ Esperanto. Ekde tiu unua ŝipo konstruita en Hispanio en la jaro 1896 kiu ricevis la nomon *Esperanto* ĝis hodiaŭ, preskaŭ 1.500 ZEO-j ezistas en la mondo aŭ eĉ pli bone diri, en la tuta universo, ĉar du asteroidoj ricevis la nomon *Esperanto* en la jaro 1936 kaj *Zamenhof* en 1938.

Nun nova ZEO ekzistas en Hispanio. La 31-an de oktobro de 2015, okaze de la Andaluzia Kongreso de Esperanto, oni inaŭguris en la urbo Jerez de la Frontera (Jerezo en Esperanto) la pasejo "Esperantista Pedro Naranjo Terán". La unua propono pri la nomigo de tiu strato venis de la organizantoj de la pasintjara Andaluzia Kongreso de Esperanto. Okaze de la prezento de la Kongreso oni petis la nomigon de strato per tiu nomo al la magistrato de Jerezo, kiu ekde la unua momento montris favoran opinion al la nomigo de strato per la nomo de la plej elstara esperantisto de la urbo.

Pedro Naranjo Terán (Jerezo 1887-1968) lernis la lingvon aŭtodidakte en la jaro 1917 kaj nur unu jaro poste li jam instruis Esperanton ĉe li mem kaj poste ankaŭ en la sidejo de la *Ateneo Jerezano*, en kies bulteno li aperigis ĉiunumere informojn pri Esperanto. Krome li diskonigis la utilecon de la lingvo kiel internacia komunikilo inter la vin-produktistoj de sia urbo. Pedro Naranjo, dum sia tuta vivo eĉ post la hispana civila milito, estis aktiva esperantisto kaj ne ĉesis propagandi kaj disvastigi la internacian lingvon.

Nu, la inaŭguro okazis dum la unua mateno de la Andaluzia Kongreso, ĉeestis pli ol 60 homoj kaj prezidis la ceremonion, kune kun la prezidanto de AEU, la skabeno pri Kulturo de la magistrato de Jerezo, kiu emfazis la internaciecon de la urbo kaj la streboj de Pedro Naranjo Terán en la diskonigo de Esperanto en Jerezo kaj de Jerezo en Esperantio. Ne tro ofte ni, la esperantistaro, povas esti fieraj pro la pozitiva agnosko de la aŭtoritatuloj, sed ĉi-foje tio okazis en Jerez.



Anekdote ni diros, ke kaj la magistrato kaj la organizantoj de la Kongreso esploris cele trovi la idaron de S-ro Pedro Naranjo antaŭ la inaŭguro de la strato, sed ni ne sukcesis. Tamen, surprize, kelkaj monatoj post la okazigo de la Esperanto-Kongreso, kaj do de la inaŭguro de la strato, ni ricevis leteron de nepino de S-ro Naranjo, kiu trapasis tiun strato kaj ŝi ege surpriziĝis

vidante la tabulon. Kompreneble ni jam kontaktis kun ŝi.

Sendube omaĝi al Zamenhof aŭ al Esperanto estas bonega ideo, tamen, devige ni devas memori ankaŭ tiujn homojn kiuj tutfiere sentis la internacian lingvon, la nomigo de strato per lia nomo estas nur malgranda pago.

J.M. Rodríguez

# PRI GRUPOJ KAJ ASOCIOJ

## Andaluzio

La pasintan 5-an de marto okazis en la Fakultato pri Informadiko de la Universitato de Malago renkontiĝo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, kies ĉefa punkto estis debati pri la ĵus okazinta 19-a Andaluzia Kongreso de Esperanto de Jerezo. Ĉi tiu kongreso, ĝis nun, estas la plej multnombra andaluzia kongreso, partoprenis en ĝi proksimume 70 homoj. Oni elstaris ankaŭ la prelegojn okazintajn kaj kompreneble oni dankis la prelegantojn, S-ro Duncan Charters, D-ino Rafaela Urueña kaj S-ro Alejandro F. López de Vergara, profesoro de Esperanto en la Universitato de La Laguna (Kanariaj Insuloj). La kongreso okazinta en Jerezo estos bona ekzemplo por tiuj kiuj devos sinsekvi en proksimaj jaroj.

Ĉi tiel, oni decidis organizi la venontan Andaluzian Kongreson en la urbo Antekero, fine de la monato oktobro, sub la temo *Esperanto kaj Naturo: ĉielo kaj tero*. Oni volas profiti la naturajn mirindaĵojn kaj pejzaĝojn de la malaga vilaĝo Antekero, facile atingebla pere de rapida trajno AVE. Oni planas organizi piedan ekskurson tra *El Torcal*, viziti la prahistoriajn dolmenojn de la



urbo kaj ankaŭ oliv-muelejon. Fine, oni parolis ankaŭ pri nokta stel-observado ĉe la Astronomia Observejo de El Torcal.

Okaze de la kunveno, la kasistino de AEU informis pri la monaj rimedoj de la asocio, kiu feliĉe fartas bone laŭ la ekonomia vidpunkto. Oni sciigis ankaŭ pri

la demarŝoj ĉe la Universitato de Kordovo, kie oni prezentis, nome de la asocio, oficialan peton por ke la diplomo pri kono de la internacia lingvo Esperanto estu agnoskata de tiu universitato, kaj do de la ceteraj andaluziaj universitatoj. Similan peton oni prezentos baldaŭ ĉe la Universitato de Malago.

Fine, oni informis pri la sukcesaj rezultoj de nia samideanino Fátima Jiménez, kiu ricevas stipendion de AEU por sekvi universitatajn studojn en Poznan (Pollando) pri Interlingvistiko kaj Esperanto.

La renkontiĝo finiĝis per manĝado, dum kiu oni skizis la unuajn bazojn por la programo de la venonta 20-a Andaluzia Kongreso de Esperanto en Antekero (Malago).

J.M. Rodríguez



## Malago

Okaze de la 17-a Israela Kongreso de Esperanto, nia samideano Carlos G. Spinola kaj lia edzino, flugis al Tel-Avivo kun la intenco partopreni kaj prelegi pri la Movado en Hispanio kaj Andaluzio. Nia Asocio donacis kelkajn librojn pri Hispana Literaturo: *Sanga Nupto*, *Platero kaj mi*, *La stultaj infanoj* kaj la verkon *D. Kihoto de la Manĉo*, broŝurojn, bultenojn, ktp. Kompreneble li ne forgesos propagandi la hispanan kongreson kaj kunportis aliĝilojn pri la evento. Ni deziras al li bonan vojaĝon kaj al la organizantoj de la Kongreso, fruktodonan kaj sukcesan eventon.

## Ekstremaduro

### Badaĥozo



#### Charla + Lección 0 de Esperanto El idioma internacional

Viernes 4 de marzo a las 6 de la tarde.

Local de la CNT (Ronda del Pilar, 93 - Badajoz)

Las personas interesadas podrán unirse a un curso rápido y gratuito

### KURSO DE ESPERANTO EN BADAĤOZO

La 4-an de marto okazis en Badaĥozo (Ekstremaduro), en la sidejo de la sindikato CNT, prelego pri Esperanto. Kiel konsekvenco, formiĝis grupo de homoj interesiĝantaj en la lernado de la internacia lingvo, kaj organiziĝis baza kurso en la urbo.

La 3-an de aprilo la ĉefa ĵurnalo de la provinco, "Hoy", publikigis raporton pri la kurso kaj la lingvo, tre favora.

Ni memoru ke en tiu provinco okazos la venonta Hispana Kongreso, kaj ambaŭ okazaĵoj kontribuas al la notinda kresko en la disvastigo de Esperanto en la regiono.

En la foto, Andrés Plaza kaj José María Salguero, en la inaŭgura leciono de la kurso.



## MADRIDO

### ĜENERALA KUNSIDO DE MEL



La lundon 25an de januaro okazis la ĝenerala kunsido de MEL.

Estis traktataj la kutimaj devigaj aferoj, kiel informo pri la nombro de membroj (tute stabila, kun samnombraj ekzistoj kaj nov-aliĝoj), aprobo de la kontoj de 2015 kaj de la buĝeto por 2016, aprobo de la raporto de aktivaĵoj de 2015 kaj propono pri novaj aktivaĵoj por 2016. Ili ĉiuj estis aprobitaj unua-

nime.

La Kunsido aprobis la nomumon de nova kasisto, pro demisio de José Francisco Platas pro sanproblemoj. Estis elektita por tiu posteno Jaime Vinielles de Pereda. En la foto vi povas vidi la novan estraron subskribante la oficialajn protokolojn.

### PREZENTADO DE ESPERANTO EN FUENLABRADA KAJ MAJADAHONDA

La 26-an de januaro okazis prezentado de la lingvo Esperanto en la oficiala lingvo-lernejo de Fuenlabrada (Madrido), kiu situas en la strato Islandia de tiu urbo.

Enkondukis la temon Pedro Sanz, poste Ricardo Biurrun rapide prezentis la historion kaj ĉirkaŭajn faktojn pri Esperanto kaj laste Pedro Hernández skizis la gramatikon. Klere kaj alloge ili montris nian lingvon.

La salono plenis kaj, laŭdire, multaj venis volonte. Fakte, la profesorino pri la germana multe strebis por diskonigi la eventon kaj altiri publikon. Malmulta tempo restis por demandoj de la publiko, sed pluraj homoj, ĉefe instruistoj, prezentis trafajn demandojn. Nekredeble, neniu demandis kiom da homoj parolas Esperanton.

La prelego rezultis vere sukcesa. Oni konsideras la eblon krei en la Lernejo grupon de (mem)lernantoj de Esperanto. Sekve, oni provos same prelegi en aliaj lingvolernejoj. La agadon iniciatis Pedro Sanz nome de MEL.

Aliflanke, Alejandro Escobedo prezentis Esperanton antaŭ mezlernejoj la pasintan 15-an de marto, ene de la kultura semajno de la lernejo San Luis Gonzaga, de Majadahonda, sekve al invito de la instruistoj.

# VIZITO DE ESPERANTO-AKTIVULOJ ĈE HEF

Inter la 21 kaj la 24 de januaro vizitis Madridon Sara Spanò kaj Francesco Maurelli, konataj esperantaj aktivuloj, devenantaj el Italio kaj nun loĝantaj en Munkeno (Germanio).

La vendredon 22an ili prelegis kaj babilis en la HEF-sidejo. Unue Sara paroladis pri trejnado de organizo-responsuloj, kaj pri la eblecoj peti subvenciojn je eŭropa nivelo, pri kio ŝi havas sperton kiel respondeculo de la entrepreno Kosmo. Poste, Francesco parolis kaj debatigis pri la idearo de Zamenhof.



La sabaton ili turismis en Madrido akompanate de kelkaj esperantistoj, inter alie de Javier Romero Tello, el Herrera del Duque, ĉeforganizanto de la venonta Hispana Kongreso de Esperanto, kiu tiam troviĝis en Madrido.

Sara Spanò partoprenos la Kongreson de Herrera, kie ŝi inaŭguros AMO-seminarion, kiel respondeculo de UEA pri Aktivula Maturiĝo.

---

## KORESPONDPEŬO

Svetlana, 44 jaraĝa. Miaj hobiaj estas vojaĝoj, muziko, kantado... Mi kolektas bildkartojn, mone-rojn... Mia adreso:

**Svetlana Sokolova, str. Kalinina 17-101, Krasnojarsk, 660048, Siberio, Rusio.**

# PARTOPRENO EN KONFERENCO PRI SOCIA HISTORIO EN VALENCIO

Inter la 30a de marto kaj la 2a de aprilo okazis en Valencio la Eŭropa Konferenco pri Socia Historio (ESSHC). Ĝi estas kongreso de esploristoj en tiu areo, kiu disvolviĝas ĉiun duan jaron sub la organizado de la Internacia Instituto pri Socia Historia bazita en Amsterdamo <https://socialhistory.org/>

Unu el la podiaj diskutoj, ene de la sekcio pri historio de la laboro, pritraktis la rilaton de anarkiistoj al kosmopolitismo. Sub la instigo de Ulrich Lins, la prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, José Antonio del Barrio, kunlabore kun la japana kolego Usui Hiroyuki (membro de Japana Esperanto-Instituto kaj konsilanto ĉe "El Popola Ĉinio"), proponis al la organizantoj komunikon pri la rolo de Esperanto en tiu kunteksto, sub la titolo: "Sennaciismo, ĉu nun aŭ en la estonto: dilemo por Esperanto-parolantaj anarkiistoj". Ili volonte akceptis ĝin kaj mi mem ĝin prezentis en la konferenco, la 30an de marto.

La resumon de la artikolo eblas legi (anglalingve) en la retejo de la Konferenco: <https://esshc.socialhistory.org/>



En la teksto ni prezentas la laboristan Esperanto-movadon, kaj aparte tiun anarkiistan, la ekeston de SAT, la polemikojn inter sennaciistoj kaj internaciistoj, la rilatojn inter eŭropaj kaj aziaj anarkiistoj, kaj kiel tiu kosmopolitismo disvolviĝis en la praktiko. Dum la prezentado mi komentis ankaŭ pri la Esperanto-movado en Hispanio kaj aparte pri la speciala rolo de la anarkiistoj.

La sperto estis tre pozitiva. Homoj tre interesiĝis pri la temo, kaj pluraj komentis al mi kiom interesa montriĝas la historio de la Esperanto-movado kaj kiom malmulte oni scias pri ĝi ekster niaj rondoj.

La konferenco disvolviĝis komplete en la angla lingvo. Tamen, mi ne povis rezisti la okazon por diri kelkajn vortojn en Esperanto ĉe la komenco, kio estis akceptita kun komprenemaj ridetoj ĉe la ĉeestantoj. Krome, kaj surprize, inter la prezentantoj en la sama sekcio troviĝis alia esperantisto, Davide Turcato, kvankam lia prezento ne rilatis specife al nia lingvo. Tamen, homoj foje povis konstati kiel dialogoj eblas en Esperanto.

La prezentadoj de tiu sekcio estos probable kolektitaj en libro, sed oni ankoraŭ ne decidis la detalojn pri la eldonado.

Mi profitis la vojaĝon por rendevui kun kelkaj valenciaj esperantistoj, la vendredon, kaj viziti la kulturcentron La Rambleta, kie oni planas baldaŭ proponi ekspozicion pri nia lingvo.

José Antonio del Barrio

# Dokumentoj alvenintaj al la biblioteko en 2015

## Dum la jaro 2015 eniris la bibliotekan katalogon sekvaj dokumentoj:

### *Anonima donacinto:*

Codorníu y Stárico, Ricardo. *Esperanto : gramática completa y elementos del diccionario en ¿verso?.* 1906

*Beletra almanako. N-ro 19 (februaro 2014)*

*Beletra almanako . N-ro 21 (oktobro 2014)*

*Beletra almanako . N-ro 22 (februaro 2015)*

*Beletra almanako . N-ro 23 (junio 215)*

### **Donacinto: Jorge Camacho**

*Iam kompletigota plena verkaro de L. L. Zamenhof.* [1 CD-ROM]. Libroteko Tokio, [ĉ. 2014]

*Vojaĝo al Hirosima.* Hirosima Esperanto-Centro, 1987

Dobrzyński, Roman. *Rakontoj el Oomoto.* Skonpres, 2013

### **Donacinto: José María Salguero**

Büchner, Georg. *Lenz.* Artur E. Iltis, 1985

Dijk, Ziko van. *Vikipedio por vi.* Espero por E@I, 2008

### **Donacinto: Esperanto-Grupo de Tuluzo**

Jaoui, Agnès. *Familia etoso. Teatro Grupo de Tuluzo, 2005.*

### **Donacinto: Biblioteca Nacional de España**

*Coleccionismo cervantino en la BNE.* Biblioteca Nacional de España, 2015

### **Donacinto: Pekina Esperanto-Asocio**

*Konciza historio de la ĉina Esperanto-movado.* Nova Stelo, 2004

### **Donacinto: Esperanto-Ligo en Israelo**

Oz, Amos. *Esperanto : unu el ok rakontoj el la libro "Inter amikoj.* Esperanto-Ligo en Israelo, 2015

### **Donacinto: Roberto Garvía**

Garvía Soto, Roberto. *Esperanto and its rivals.* University of Pennsylvania Press, 2015

### **Donacinto: *Rafaela Urueña***

Urueña Álvarez, María Rafaela. *Eŭropa Unio, paŝon post paŝo*. Andaluza Esperanto-Unuiĝo : Esperanta Jura Asocio, 2014.

### **Donacinto: *Miguel Fernández***

Privat, Edmond. *Libero doktrina kaj sincero*. Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia, [2003]

*Memorindaj anarkiistoj kaj anarkiisma esperantismo*. SATeH, 2014

Maíz Chacón, Jorge. *Hirsutos y maleantes*. Mallorca, 2014 (Enestas (p. 64) la poemo en Esperanto: Ruĝa pastelo, blua pastelo)

### **Donacinto: *Stano Marček***

Marček, Stano. *El esperanto por el método directo*. S. Marček, 2010

### **Donacinto: *Eduardo Larrouy***

Arana Luzuriga, Aitor. *Euskara-esperantoa, esperantoa-euskara hiztegia*. Erroteta, 2015

### **Donacinto: *Kataluna Esperanto-Asocio***

Alós i Font, Hèctor. *Els esperantistes catalans : un col·lectiu pacifista en un món global*. Institut Català Internacional per la Pau, 2012

Phillipson, Robert. *Llengües internacionals i drets humans internacionals*. Associació Catalana d'Esperanto, 2008

Alós i Font, Hèctor. *Esperanto i drets lingüístics*. Associació Catalana d'Esperanto, 2008

*Esperantistaj voĉoj el la katastrofo 2011*. Japana Esperanto-Instituto, [2015]

### **Donacinto: *Sibayama Zyun'iti***

*Vivis, vojaĝis, verkis : esearo omaĝe al Vasilij Eroŝenko, 1890-1952*. Komitato por Celebri la 125-jaran Jubileon de Eroŝenko, 2015

Ana Manero

---


## **Nekrologe**

En decembro, neatendite forpasis **Antonio Suárez Rodríguez**, elstara kanaria esperantisto kaj Prezidanto de Esperantista Societo de Tenerifo. Naskiĝinta en tiu insulo en 1944, li profesie komence estis konstru-teknikisto, sed baldaŭ aliĝis al la familia presejo, kie li laboris ĉe grafika dezajnado kaj eldonado de libroj, afiŝoj, broŝuroj ks. Li esperantistiĝis tuj post la 29-a Hispana Kongreso de La Laguna en 1969, kaj post nelonge fariĝis membro de la Estraro de ESTO, kies Prezidanto li plurfoje estis kaj ĉiam unu el la plej viglaj kaj aktivaj anoj dum la lastaj jardekoj. Specife li ĉiam estis avangardisto pri uzado de novaj teknologioj, (komputiloj, interreto...) kaj ekzemple enkondukis nin ĉiujn en la uzado de *Skype* por prelegoj el fremdaj landoj. Lia lasta faro en ESTO estis prelego pri lia vojaĝo al la UK en Lillo kaj postkongresaj vizitoj al francaj geamikoj. Fine de pasinta jaro grava malsano malkrovita lastmomente neatendite forprenis lin. Per lia serena kaj racia sinteno antaŭ la alvenanta morto li donis al siaj geamikoj lastan montron de sia eksterordinara animo, kiun ni longe memoros.

ESTO

# PREZENTO DE *BOHEMIAJ LUMOJ* EN MADRIDA TEATRO

La pasintan 19an de marto prezentiĝis *Bohemiaj lumoj*, mia esperantigo de *Luces de bohemia*, en konata alternativa teatra spaco de Madrido, la salono Kubik Fabrik. Ni celis ĉefe neesperantan publikon. Al la madrida esperantistaro jam en du pli fruaj okazoj mi prezentis la verkon. Unuafoje, kadre de la pasinta Zamenhof-tago, kiam, malgraŭ niaj klopodoj ĉe la presejo, la libro ankoraŭ ne estis vidinta la lumon. Duafoje, en la HEF-ejo, nur kelkajn tagojn poste, la 21an de decembro. Tiam, kun ekzemplero de la libro enmane, fine!, mi povis, krom malkovri al niaj geamikoj la ĉefajn ŝlosilojn de la verko kaj la tradukajn malfacilaĵojn en ĝi, voĉlegi al ili ĝian *Dekan scenon*. Sed ĉi-okaze ni volis fari plian paŝon. Ni konsideris oportuna prezenti nian libron al la publiko ekstera al Esperantujo. Temas pri ĉefverko de Ramón María del Valle-Inclán kaj de la literaturoj hispana kaj eŭropa. Kaj ĉi-jare oni solenas la 150an jubileon pri la naskiĝo de tiu universala galego kaj la 80an datrevenon de lia morto. Neniu momento pli oportunus ol ĉi tiu por plenumi tian prezenton. Sed, krome, ni konsideris, ke ekster Esperantujo ni devas atesti pri nia ekzisto kaj ke la plej bona maniero tion fari estas pere de niaj kulturaj produktoj. Ni ja kreas propran kulturon kaj eksportas al la mondo hispanan kulturon en traduka formo. Sciigi tion al neesperantistoj ŝajnas al ni pli efika ol distamtami la “grandegan facilecon” de nia lingvo, kio, krom ke ĝi ne tute veras, apenaŭ altiras la atenton de la homoj. Nia kunulino Mati Montero jam de longe tion praktikas: ŝi senlace bataladas por la normaligo de la ĉeesto de Esperanto en la kultura vivo de Madrido. Dank’ al tio, en kelkaj el ĝiaj kulturaj medioj, ĉiam pli ni rigardatas ne kiel marsanoj, sed kiel unu el la multaj kultur-faraj kolektivoj de la hispana ĉefurbo. Mirinde, ĉu ne?



Tiukadre, MEL konsideris oportuna la proponon de Mati kaj financis la prezenton de *Bohemiaj lumoj* en Kubik Fabrik. Ĉi teatra salono posedas grandan scenejan spacon, sed ĝi estas konceptita por ne granda nombro da spektantoj. Por, proksimume, kvindek homoj. En la vespero de la 19a de marto, ĝi preskaŭ plenplenis. Kompreneble, ne mankis madridaj esperantistoj, sed videblis ne magra kvanto da neesperantistoj supozeble interesataj al niaj lingvo kaj kulturo.

En la unua parto de la aranĝo, mi prezentis la verkon en la hispana. La atento de la publiko kaj ties entuziasma reago ĉe la fino kaptis min. En la dua parto, teamo de madridaj e-istoj: Jorge Camacho, Félix Lobo, Ana Manero, Mati Montero, Manolo Parra kaj mi mem, prezentis, unue en la hispana kaj tuj poste en Esperanto, aktoran voĉlegon de la *Dekdua sceno* de la verko. Kiel pozitive min surprizis miaj gekompanoj! Kia plezuro aktori kun ili! Kiel mi dankas ilin pro ilia kontribuo al la sukceso de la kultura vespero!... En la tria parto, ni starigis dialogon kun la publiko. Belis konstati la ĉeeston kaj la simpatian al ni montratan de gravaj hispanaj kulturhomoj, kiel la poetino María Ángeles Maeso. Fine, mi subskribis ekzemplerojn de la libro. Krom unu el ili, oni vendis ĉiujn alportitajn de MEL, la organizo responsa pri la eldono. Menciindas ke tiu eldono efektiviĝis kun la morala apogo kaj la teknika helpo de Libroservo de SATEH (fakte, de Pedro Sanz, aŭtoro de la kompostado kaj de la kovrilo).

La opinioj ricevitaĵoj pri nia kultura vespero estas kor-karesaj. Multaj el la ĉeestintaj neesperantistoj esprimis al ni sian bonan impreson pri nia seriozo, pri la kvazaŭprofesia flueco de nia tuta aranĝo, pri ties kulturaj alteco kaj intereso, pri la nesuspektita beleco kaj natureco de nia lingvo... Al la oreloj de eminenta hispana dramaturgo, kies nomon mi malkovros al vi aliokaze,



alvenis eĥoj de nia prezentado kaj manifestis sian deziron konatiĝi kun mi, kio honoras ne nur min, sed ĉefe nian tutan teamon kaj Esperanton. Kultura agantino, kiu por la unua fojo aŭdis vortojn en nia lingvo, konfesis al mi sian raviĝon el nia tuta prezentado kaj sian deziron lerni tiun belegan lingvon, kiun ŝi ĝuis tiuokaze... Liberecana grupo de la kvartalo Carabanchel petis min ripeti mian prezenton kadre de kulturaj renkontiĝoj okazontaj en ĝia sidejo, nomata EKO, en la monato majo... Nu, ĉio ĉi pravigas la trafekon de la veto fare de Mati kaj de MEL por nia elkatakombiĝo kaj por nia senkompleksa kaj senĝena agado sur la sama tereno, sur kiu disvolviĝas la hispanlingva kulturo en niaj urboj kaj vilaĝoj.



Juan del Castillo okupiĝis pri filmado de la tuto. María Zocato alŝutis la filmitan videaĵon al YouTube. Ĝi spekteblas ĉe: [<https://youtu.be/fPE7d935pDE>]. La esperantistoj, kiuj preferas spekti nur la prezentadon de la *Dekdua sceno* de *Bohemiaj lumoj* en Esperanto, povas turni sin al: [[https://youtu.be/qGEoSgz\\_SxE](https://youtu.be/qGEoSgz_SxE)].

Miguel Fernández



# PROGRAMO DE LA 75a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO HERRERA DEL DUQUE, 30a junio-4a julio, 2016.

Karaj samideanoj, legantoj de nia kara revuo *Boletín*, kiel promesite, jam de antaŭ (preskaŭ) unu jaro, ni multe laboradas por aranĝi bonan programon por la jubilea 75a Hispana Kongreso de Esperanto, kiu okazos en Herrera del Duque, municipo de la komarko konata kiel "La Siberia", provinco de Badaĥozo, inter la 30a de junio kaj la 4a de julio.

La programo estos tiel bunta, ampleksa kaj altkvalita ke ĝi bezonas pliajn tagojn por plibone ĝui ĝin. Jes, ni planis antaŭkongresajn tagojn por povi organizi aliajn gravajn programerojn ("La Tria Bohemia Nokto" en Madrido, la 28an de junio, kaj tritaga AMo-seminario, 29a de junio-1a de julio, paralele al la Kongreso, kun la temo: "Aktualaj eblecoj por disvastigi Esperanton")

Herrera del Duque estas malgranda urbeto, apenaŭ 4.000 loĝantoj, sed Esperanto transformos ĝin, dum kelkaj tagoj, en la ĉefurbo de la internacia amikeco.

Dum mi skribas ĉi liniojn estas aliĝintaj pli ol 125 esperantistoj el pli ol 14 landoj de la mondo.



...Malgranda UK en la ekstremadura Siberujo...

La 75a Hispana Kongreso de Esperanto estos festo.

Festo kaj omaĝo al la teatro, "Vivu la teatro!" Miguel Fernández gvidos kune kun Ana Manero novan version de ĉi mirinda kolektiva spektaklo.

Ni ankaŭ povos ĝui teatran mondan premieron, "La Kredito" prezentota de Georgo Handzlik kaj Sasa Pilipovic.

Kiel dirite, la 28an de junio, mardo, en Madrido okazos la "Tria Bohemia Nokto", antaŭkongresa literatura programero surbaze de la itinero trairita de Makso Stelo kaj S-ro Latino de Hispalis, la protagonistoj de *Bohemiaj lumoj* (ĉefverko de la moderna teatro de Hispanio, esperantigita de la poeto kaj tradukisto Miguel Fernández)

Festo kaj omaĝo al la literaturo, al la Ibera Skolo, al Jorge Camacho, al Miguel Fernández, Liven Dek, Suso Moinhos, Mikaelo Bronŝtejn, István Ertl. Dum la 75a Hispana Kongreso de Esperanto prezentiĝos novaj gravaj libroj de hispana verkistoj.

Ankaŭ oni povos aŭskulti prelegojn pri diversaj temoj, HEF prezentos la bitan eldonon de la fama verko D. Quijote, omaĝe al 400 centjariĝo de la morto de Cervantes, Kani pri Ekstremaduro kaj Guadalupe, Elena Sharavina kaj Katerina Arbekova pri la rusa Siberio, Xavi Alcalde pri esperantistoj dum la Unua Mondmilito, Annie Grente pri Esperanto kaj Tanzanio, Lucas Barbosa pri indiĝena lingvo el Brazilo, Félix Jiménez pri Instruista Trejnado en Poznan, Javier Romero pri Martinus kaj Zamenhof.

Kaj se ni parolas pri la omaĝo al la muziko, sendube la jubilea Kongreso estos memorinda. *Asorti*, fama muzikgrupo el Litovio, la duopo Ĵomart kaj Nataŝa, kaj nia franca kamarado JoMo, amuzigos nin ĉiunokte.

Ni ne forgesu la regionan grupon *Acetre*. Ni preparas surprizon por vi ĉiuj...

Unu tagon antaŭ la komenco de la Kongreso, la 29an de junio, merkredo, komencos AMo-seminario: "Aktualaj eblecoj por disvastigi Esperanton", kun la partopreno, i.a., de Sara Spanò, Duncan Charters, Irek Bobrzak (praktika laborsesio kiel krei podkaston), Ana Manero ("Eltiri profiton el retkatalogoj"), kaj Liven Dek (esperantaj filmoj), inter aliaj aktivuloj.

Kaj pri la ekskursoj, vi povos viziti la faman vilaĝon kaj Monaĥejon de Guadalupe. La postkongresa ekskurso direktiĝos al la monumentaj Trujillo kaj Cáceres, juveloj de la historio.

Karaj samideanoj, se vi ankoraŭ ne aliĝis al la jubilea 75a Hispana Kongreso de Esperanto, ne preterpasu ĉi okazon. Rezervu tiujn tagojn. Ili estos neforgeseblaj. Ja jubileaj...!

Ni, pli ol 125 amikoj viaj, atendas vin.

Elkore salutas, nome de la LKK,

Javier Romero

## **AMo-seminario en Ekstremaduro lige al la 75-a Hispana Kongreso de Esperanto**

Ni povas anonci ke Hispanio gastigos tritagan AMO-seminarion de la 29-a de junio ĝis 1-a de julio de 2016. AMo-seminario, aŭ Seminario por Aktivula Maturigo estas iniciato de UEA jam celebrata en pluraj landoj de la mondo por trejni aktivulojn kaj por organizi kunan laboron.

La elektita temo por nia Seminario, aparte grava por nia Movado, estos rilata al informado: "Aktualaj eblecoj por disvastigi Esperanton".

La seminaria programo disvolviĝos parte paralele al la 75-a Hispana Kongreso de Esperanto, okazonta en Herrera del Duque de la 30-a de junio ĝis la 4-a de julio 2016. Ambaŭ eventoj estos tamen formale sendependaj, kaj la Seminario komenciĝos jam la antaŭan tagon.

José Antonio del Barrio, Prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, kaj José María Salguero, Sekretario de la Loka Kongresa Komitato, kunordigos la seminarion; la gvidantoj de la diversaj sesioj estos anoncigitaj dum la venontaj semajnoj.

Sara Spanò, Komisiito de UEA pri Aktivula Maturigo, enkondukos la AMo-programon kaj helpos maksimumigi la rezultojn de la seminario, kunlabore kun la lokaj kunordigantoj, la gvidantoj kaj la partoprenantoj en la diversaj sesioj.

La ĉeesto estos senpaga, sed necesas sinanonci al la organizantoj. Por ĉiuj ajn detaloj, kontaktu la organizantojn en la retadreso [kongreso@esperanto.es](mailto:kongreso@esperanto.es)

# PRAKTIKAJ INFORMOJ PRI LA HISPANA KONGRESO

## GASTIGADO

En la antaŭa numero de Boletín ni havigis liston de hoteloj kaj aliaj gastigeblecoj, kiu troviĝas ankaŭ en la reto en <http://www.esperanto.es/hef/index.php/kongreso/logado>. La kosto de tranoktado en Hotelo estas proksimume:

dulita ĉambro/kun matenmanĝo/50 eŭroj tage.

unulita ĉambro/kun matenmanĝo/35 eŭroj tage.

Ni forte rekomendas ke la aliĝantoj rapide rezervu sian restadon, ĉar la sukceso en la aliĝado de kongresanoj povas kaŭzi ke la lokoj en la hoteloj baldaŭ elĉerpiĝos.

Ekzistas aliaj alternativoj, ekzemple privataj domoj kaj proksima kampadejo, je tre favora prezo, sed oni ne prokrastu la rezervadon.

La Kongreso disponas je senpagaj lokoj en junulargastejo de Peloché, kie eblas tranokti. La transporto de tiuj gastoj al kaj el Herrera povos esti zorgata de la organizantoj nur en interkonsentita horaro; dum povos esti libere farita de la interesatoj. ATENTU: Ĉar la nombro estas limigita, la rezervo estos farita laŭ strikta ordo de mendado.

Turnu vin al la organizantoj kiam vi havos demandojn.

La kosto de manĝado (en hotelaj restoracioj) estas po ĉirkaŭ 9 eŭroj tagmanĝo aŭ vespermanĝo.

## ALVENEbloj

La plej bona maniero veni al Herrera estas per aŭto, sed ekzistas alternativoj por tiuj venantaj tra Madrido.

La organizantoj luos du busojn por la partoprenantoj (ĝi kostos po inter 10 aŭ 15 € /individuo) kiuj ekiros al Herrera la 29an junio je la 8:00 matene por tiuj kiuj partoprenos en la AMO-seminario kaj la 30an junio je la 15:00 por ĉiuj aliaj. Se ne ekzistas sufiĉa da demando pri unu el ili, oni organizos komunan vojaĝon per la privataj aŭtoj de kongresanoj. Kontakti la organizantojn ĉe [kongreso@esperanto.es](mailto:kongreso@esperanto.es) se vi interesiĝas pri tiu alternativo.

Ĉiukaze, por homoj vojaĝontaj en alia momento, ekzistas regulaj busoj el Madrido (Estación Sur) al Herrera je la 15:00 kaj la 19:00 horoj. La entrepreno estas “Samar” kaj la regula linio estas 903.

Homoj kiuj havos pli da tempo, povos vojaĝi al Herrera jam la antaŭajn tagojn, ĉar oni planas antaŭkongresajn malpli formalajn ekskursojn por ili.

Por reveni post la kongreso, Cáceres kaj Trujillo prezentas multajn eblecojn de publika transporto al diversaj urboj de la lando.

## VIZITO AL HERRERA DEL DUQUE

La 25-an de aprilo la prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, José Antonio del Barrio, vizitis Herrera del Duque kaj renkontiĝis kun la prezidanto kaj sekretario de la Loka Organiza Komitato de la 75 Hispana Kongreso de Esperanto, Javier Romero kaj José María Salguero (Kani). Poste ni tri vizitis la urbodomon kaj tie renkontiĝis kun la urbestro, Saturnino Alcázar, kaj kelkaj urb-konsilistoj de la urbo.



Ni profitis la okazon por komenti diversajn konkretajn aferojn de la organizado de tiu ĉi Renkonto, kiu okazos inter la 30a de junio kaj la 4a de julio. Oni informis la lokajn aŭtoritatojn ke oni esperas la ĉeeston de pli ol 150 kongresantoj ne nur de Hispanio, sed de pluraj aliaj landoj de Eŭropo kaj aliaj mondo-partoj. Ni konfidis ke la evento estu tre pozitiva por la urbo, kaj la diskonigo de la regiono, kaj ni konstatis la apogon ne nur de la urbaj aŭtoritatoj, sed ankaŭ de la provincaj kaj regionaj, kiuj subvencios parton de la kostoj de la kultura programo.

Ni diskutis la organizadon de la gastigado de la kongresanoj, kaj ni vizitis la junulargastejon kiun la urbestro havigos al ni, kaj kie nun finiĝas la riparlaboroj por ke ĉio estu preta akurate. Ni krome studis alternativojn por gastigado de kongresanoj, ĉar ĝis nun la ritmo de aliĝo estis tiel sukcesa, ke jam restas en la propra urbeto malmultaj hotelaj lokoj ankoraŭ liberaj. Restas disponeblaj tamen ruraj domoj kaj oni planas kontakti privatulojn kiuj deziru luigi apartamentojn. Ruraj domoj restas ankoraŭ en la ĉirkaŭaĵo, kio estos taŭga solvo por tiuj kiuj disponos el propra aŭto, inklude en proksimaj vilaĝoj Fuenlabrada aŭ Peloeche.



Ni ankaŭ ekzamenis denove la kongresejon, akompanate de la urbkonsilistino pri kulturo, kaj kontrolis la bezonojn de salonoj, la teknikaĵojn, ktp. Ni konstatis denove la altan kvaliton de la kongresejo, vera palaco de la kulturo.

Ni ankaŭ studis surloke la turisman programon. La prezidanto de HEF vizitis ankaŭ la urbon Guadalupe, al kie direktiĝos la ĉefa ekskurso de la kongreso. Ĝi certe montriĝas tre inda celo por ĉiuj kongresanoj.

Ni studis la alian antaŭviditan gravan ekskurson, postkongresan, kaj pri tiu estas grava anoncinda novaĵo. Ni planis dekomence ekskurson lunde al grava romia urbo Mérida, sed intertempe okazis du kontraŭaĵoj: unue, lundojn la Romia Muzeo, kiu estas grava parto de la vizito, fermiĝas, kaj due la Festivalo de Klasika Teatro, kiu kutime komenciĝas komence de julio, ĉijare komenciĝos nur la 6an de julio. Ambaŭ mankoj malvalorigis la komencan planon, kiu estus estinta utila por fini la kongreson en urbo, tiele ke forveturantoj, post la teatro, tranoktu tie kaj forveturu matene el tie, sen reveni al Herrera. Tiu lasta planero restos, sed por Trujillo-Cáceres, kiuj estas du rekomendindaj urboj kiujn ni povos viziti lunde (Trujillo matene kaj Cáceres posttagmeze), tiele ke forveturantoj povos forveturi el tie kaj aliaj revenos al Herrera. Deziruntoj viziti Mérida povos fari ĝin marde, kaj la organizantoj klopodos helpi tiucele.

Ni ankaŭ studis la organizadon de la AMo-Seminario kaj aliaj programeroj. Ni informos indvidue al la aliĝintoj al la kongreso, per reta poŝto, pri la novaĵoj, kaj ankaŭ publikigos aliajn informojn en la retejo de la Federacio.

Sume, ni restis tre kontentaj pri la marŝo de la organizado kaj la apogo de la urbo, kaj ni certas ke kongresanoj travivos neforgeseblan eventon.

## **POSTKONGRESA EKSKURSO**

La lundon 4-an de julio, kiel postkongreso oni veturos al Trujillo kaj poste al Cáceres, ambaŭ estas urboj kun interesaj kvartaloj mezepok-renesancaj. Ni ne planas pagi por eniri en muzeoj aŭ pagendaj monumentoj kaj ni kalkulas ke la buso povas kosti po ĉirkaŭ 10 €. En Trujillo ni vizitos la belegan placon kaj mezepokan kvartalon ĝis la kastelo, kiu estas ĉirkaŭirebla por rigardi la pejzaĝon. Poste oni veturos al Cáceres. Ĉirkaŭ la placo estas multaj lokoj kie eblas memzorgi por tagmanĝi. Post tagmanĝo oni promenos tra la antikva kvartalo. Tiuj kiuj deziras fini sian kongreson, povos kunporti valizon en la buso kaj iam repreni ĝin por forveturi. Tiu kiuj deziras reveni al Herrera, povas fari ĝin per la buso.

## **LA HISPANA KONGRESO EL VARSOVIO KAJ KALININGRADO**

La informoj pri la hispana “Siberio”, kaj pri la Kongreso de Esperanto kiu okazos ĉi-somere en tiu regioneto, venas ankaŭ el la alia flanko de Eŭropo. Artikolo pri tiu "alia" Siberio (en Ekstremaĉuro) aperis en gazeto eldonita en Rusio, specife en la enklavo de Kaliningrado. Vidu la artikolon en la retejo de “La Ondo de Esperanto” <http://sezonoj.ru/2016/03/hispanio-3/>.



Krome, kolekto de utilaj informoj pri la Hispana Kongreso de Esperanto aperas nun ankaŭ en la retejo de la podkasto "Varsovia Vento". Legu ilin ĉe: <http://www.podkasto.net/anoncoj/la-75a-hispana-kongreso-de-esperanto/> kaj samtempe profitu la okazon por aŭskulti la lastajn epizodojn de tiu retradio, kie vi trovos interalie muzikon kaj intervjuojn al kelkaj el la artistoj kiuj nin akompanos dum la renkontiĝo.

# LA ROLO DE LA VOLAPUKISTOJ EN LA FRUA DIS- VASTIGO DE ESPERANTO EN HISPANIO

Kiam oni pritraktas la ekigon de la internacia lingvo Esperanto en Hispanio preskaŭ ĉiuj esoj, kaj sendube ĉiuj artikoloj, komenciĝas per tiu unua libro<sup>[1]</sup> eldonita en Malago de la instruisto José RODRÍGUEZ HUERTAS en la jaro 1890. La historiisto de la Esperanto-Movado en Hispanio, Antonio MARCO BOTELLA en *Analoj de la Esperanta Movado en Hispanujo* sciigas informon antaŭan al tiu libro verkita de la malaga instruisto, kaj tiel, la aragona esploristo asertis ke en la jaro 1889 la bibliotekisto de la hispana Senato en Madrido, S-ro Joaquín de ARCE Y BODEGA, respondis al publika alvoko de D-ro ZAMENHOF por lerni la lingvon. Laŭ la historiisto, Joaquín de ARCE skribis al aŭtoro de Esperanto kaj poste, li ricevis, pli malpli tri ekzemplerojn de la gramatiko de la nova lingvo. Unu el tiuj lerno-libroj li sendis al S-ro RODRÍGUEZ HUERTAS en Malago kaj alian li havigis al la Mont-inĝeniero Ricardo CODORNIU en Murcio. Tamen, Antonio MARCO BOTELLA mem asertis en siaj *Analoj*<sup>2</sup>, ke tio “eble” okazis tiel, do mankas fidindaj fontoj ĉi-teme. Nun estas tempo serĉi eĉ pliajn antaŭajn datumojn al tiuj ofte rakontataj en la libroj aŭ informoj pri Esperanto en Hispanio.

Se paroli pri la komenco de la Esperanto-Movado, unue estas necese aserti, ke Hispanio ne estis malsimila al aliaj eŭropaj landoj. Tio estas, la unuaj homoj kiuj lernis, disvastigis kaj renkontiĝis ĉirkaŭ la nova lingvo elpensita de D-ro ZAMENHOF estis antaŭe volapukistoj. Ni ne forgesu, ke la Volapukista Klubo en la germana urbo Nurenbergo transiris en la jaro 1889 el la lingvo de p-ro SCHLEYER en Esperanton, same ankaŭ la fakton, ke la unuaj plej elstaraj esperantistoj estis antaŭe volapukistoj, ekz. Antoni GRABOWSKI<sup>[3]</sup>. Kaj en Hispanio okazis tute same.



En nia lando la unuaj volapukistoj organiziĝis en la jaro 1885 ĉe la Volapuk-sekcio de la *Centro Filológico Madricense* (Madrída Filologia Rondo). Estraranoj de tiu asocio estis la jam menciita Joaquín de ARCE Y BODEGA, kiu ankaŭ estis help-bibliotekisto en la Senato, profesoro de la hebrea lingvo kaj dekanato de la instruistoj en tiu *Centro Filológico*; la sekretario de la Centro estis Casto VILAR Y GARCÍA, kadizano, kiu tiam estis unu el la plej prestiĝaj poliglotoj en Hispanio kaj post kelkaj jaroj estis nomumita profesoro pri la franca lingvo en gimnazio de la urbo Sevilo. La ĉefaj agadoj de tiu Volapuk-sekcio estis la organizado de kursoj pri la lingvo kaj la eldonado de la monata revuo *El Volapük*.

En la jaro 1888 apotekisto de la urbo Gvadalaĥaro, S-ro Francisco FERNÁNDEZ IPARRAGUIRRE<sup>[4]</sup>, respondeciĝis pri la eldonado de la volapuka gazeto kaj same li organizis volapuk-sekcion ene de la *Ateneo Caracense*, la plej prestiĝa kultura centro en la urbo. Tiel, la ĉefa kerno de la Volapuka Movado en Hispanio transiris el Madrido en Gvadalaĥaron, dank'al la agadoj de IPARRAGUIRRE kaj ankaŭ de Nicolás de UGARTE<sup>[5]</sup>, militisto kaj instruisto en la Militista Akademio pri Inĝenierado<sup>[6]</sup>, kiu ĝis la jaro 1931 sidejis en



Post la forpaso de IPARRAGUIRRE en la monato majo de 1889, Nicolas de UGARTE respondecigis pri la eldonado de *El Volapük*. Liaj ĉefaj kontribuoj temis pri matematiko, scienco pri kiu li vere fakis, kaj ankaŭ pri la problemo de la internacia komunikado pere de help-lingvoj, li eĉ verkis libron pere de kiu li diskonigis la taŭgecon de la volapuka lingvo por utili kiel help-lingvo<sup>[7]</sup>.

De tempo al tempo Nicolas de Ugarte aperigis ankaŭ menciojn, foje apenaŭ sciigoj, pri novaj projektoj de internaciaj lingvoj, tre oftaj en tiu tempo. Tiel, li informis pri la projekto *Visona*, de la usona Henry COHN ellaborita en la jaro 1887; *Lingua*, de la brita George J. HENDERSON de 1888 kaj *Central Dialekt*, de la sveda August NILSON en 1889. Same okazis kiam Esperanto aperis, tiel sur la numero de la monato januaro 1889 Nicolas de UGARTE sciigis jenan informon:

*Otra lengua ha sido inventada en Varsovia por el Dr. Esperanto. Presenta, según el autor, esta ventaja inmensa sobre el volapük: que puede ser comprendida por las personas que jamás la han estudiado. He aquí la traducción en lengua Esperanto del primer versículo de la Biblia: Je la komencos...*

<sup>1</sup> RODRIGUEZ HUERTAS, José. 1890, *Gramática, Ejercicios y Diccionario de la Lingua Internacia del Doctor Esperanto*, Málaga: Imprenta de Manuel Cerbán.

<sup>2</sup> Vd. paĝon 8-an de tiu verkaĵo.

<sup>3</sup> Antoni GRABOWSKI (1857-1921), polo. Li lernis 9 lingvojn kaj li ankaŭ interesiĝis pri Volapuko. Okaze de vizito al Johann Martin Schleyer, la aŭtoro de Volapük, Grabowski eltrovis, ke la propra aŭtoro de la lingvo ne kapablis paroli flue Volapük, do ili finfine interparolis germane. Post lerni Esperanton Grabowski vizitis la D-ron Zamenhof kaj laŭdire tiu estis la unua buŝa dialogo en la lingvo Esperanto.

<sup>4</sup> Francisco FERNÁNDEZ IPARRAGUIRRE, Gvadalaĥaro (Hispanio), 1852-1889. Apotekisto kaj gimnasia profesoro pri franca lingvo. Okaze de sia partopreno en la 1-a Internacia Apoteka Kongreso okazita en Bruselo en la jaro 1885 li kontaktis kun la ĵus kreita internacia lingvo Volapük. J.M. Schleyer, aŭtoro de la lingvo, nomumis lin "*Plofed é kademal balid in Spän*" (*Unua profesoro kaj akademiano en Hispanio*).

<sup>5</sup> Nicolás de UGARTE GUTIÉRREZ VEGA, Burgos (Hispanio) 1849-1932. Inĝeniera Kolonelo de la hispana armeo kaj elstara matematikisto. La plej prestiĝa profesoro en la Inĝeniera Militista Akademio en Gvadalaĥaro, krome li estis membro de la Reĝa Akademio pri Matematikoj kaj unu el la organizantoj de la vizito de Albert Einstein al Madrido en la jaro 1923.

<sup>6</sup> La rolo en la disvastigo de la internacia lingvo fare de la Militista Akademio pri Inĝenierado en Gvadalaĥaro meritis ja alian studon, pro la fakto, ke grandaj esperantistoj pasis tra la klasĉambroj de tiu militista institucio, inter ili la Generalo Emilio Herrera Linares kaj eĉ la patro de Julio Mangada Rosenörn, kiu ankaŭ estis volapukisto. Sendube la instruoj de Nicolas de Ugarte kaj la ekster-klasĉambraj babiladoj sendube helpis la disvastigon de la help-lingvoj, ĉu Volapük, ĉu Esperanto.

# VOLAPÜK

GASED BEVÜNETIK

TEDELIK, NOLIK, LITERATIK E GĀLODIK,  
NOGAN DE ZENODAKLUB VOLAPÜKIK SPĀNA E DE ATENEO CARACENSE.

Paipubom balna in mul.  
suamdi zo dedil Ateneo Hianis  
28 in tom spadafolia. 1888.  
Boned yelik kostom: in Spān  
posetas kil. Plo Spān: frans  
fol. Velul.—Nūm. VII.

Dilekel. Dl. D. Francisco Fernández Iparraguirre, lōdōl Plaza de Santo Domingo  
nūm 4, in GUADALAJARA.

## STEIFALAM BEVÜNETIK.

Al xamōn vobadis pepotōl al steifalam bevūnetik, pejelōl fa Ateneo Caracense e Zenodaklub Volapükik Spāna (Logolōs flani ō gaseda at), sōg soga enemom eyulels sōlis D. Francisco Fernández Iparraguirre, D. Manuel Diges, D. Benito Angel, D. Manuel Sanz Benito, y D. Julián Jimeno.

Elensumōl sōls at komiti, Eyulelef pestitom e penemoms: Bisiedel eyulelefa sōl D. Benito Angel, e Sekretel sōl D. Manuel Diges, al lōdōp kela (calle del Estudio, 4, *Guadalajara*) mūton kludopotōn vobadis tefōl steifalam.  
Sōles kels desidoms legivotōn dinis plo luprāms, mūbōs mebōn pōti potōn atis sunūno Sekretele ot.

Redakelef.

## DEDIL TEDELIK.

MARTINIQUE.—S. Pierre, *Telul 29 ad,*  
1888.

Elulotob spodi ko gased lestūmik ola e ko gaseds valik kelis getob is. Pened lātik oba pedātom jōiul 16id 87. Ade-lo fovob kelosi ebeginob dō nisul de Martinika:

Klūm nisula no binom badik plo yulopels sōd hit binom ofen levemik.

Malāds lupakik kōmoms sotimo se Melop. Nu labobs pogi kel sibinom in zifs e pags valik de nisul.

Martinik pagovom dub goval pecālōl fa mōladūnal e konsālef pevālōl fa vālels valik. Mulats e blāgans, binōl lemōdikum ka vietiks, laboms ti cālis valik. Deputals tel e senatel bal pavā-loms al jāfōn kudadinis nisula. Pālams

## SECCIÓN COMERCIAL.

MARTINICA. — S. Pierre. — 29 Febre-ro de 1888.

He descuidado la correspondencia con su estimada Revista y con todas las Revistas que recibo aquí. Mi última carta fué fechada en 16 de Agosto de 1887. Hoy continúo lo que principié sobre la isla Martinica: El clima de la isla no es malo para los europeos, pero el calor es muy grande. Las enfermedades contagiosas llegan de tiempo en tiempo de América. Ahora tenemos viruela loca, que existe en todas las ciudades y pueblos de la isla.

La Martinica se rige por medio de un gobernador nombrado por el Ministro de Marina, y un Consejo elegido por todos los electores. Los mulatos y negros, que son muchos más que los blancos, tienen casi todos los empleos. Dos Diputados y un Senador son elegidos para ocuparse de los asuntos de la isla. Las producciones principales son

diskutoj pri korekta uzado de la verboj, problemoj de la refleksiva sufikso... kaj multaj aliaj gramatikaĵoj pere de kiuj estis tute videblaj la malsimilaj vojoj proponitaj de SCHLEYER kaj de la akademianoj de Volapuko.

Nicolás de UGARTE aperigis artikolon per kiu li plendis pri la problemoj por la estonteeco de la lingvo kaŭzitaĵ de tiuj kvereloj inter la aŭtoro de la lingvo kaj de Auguste KERCKHOFFS, direktoro de la Akademio de Volapuko. Videblis tiam, ke Nicolas de UGARTE iamaniere seniluziiĝis pri Volapuko kaj tion li esprimis en la hispana volapuka revuo.

La numero de la monato oktobro de 1890 de tiu revuo estas tute malsama al la ceteraj. Ses el la dekdu paĝoj de la revuo estas dediĉitaj al kompleta trastudo de la lingvo Speranto<sup>[10]</sup>, fakte sur tiu numero nenio aperas rilate al Volapuko. Nicolás de UGARTE bazas sian studon, kiel dirite, sur la broŝuro eldonita en 1887 de la propra ZAMENHOF en la franca lingvo, tamen li aludas ankaŭ al opinioj de juna ruso, Edgar de WAHL<sup>[11]</sup>, favore al Esperanto. Tio pruvus, ke Nicolás de UGARTE ankaŭ posedis la unuan vortaron Esperanto-hispanan eldonitan de De WAHL en la jaro 1889. Oni devas diri, ke la artikolo verkita de Nicolás de UGARTE pri la lingvo de la D-ro ZAMENHOF ne estis tiu tipa mallonga sciigo pri novaj lingvoj, sed tute male temas pri kompleta pristudo de la lingvo, oni parolas pri la sonoj de la literoj, pri la finaĵoj, pri pronomoj, pri verboj, tio estas, Nicolás de UGARTE ne nur sciigas pri la lingvo Esperanto, li verdire diskonigas

Kiu fonto uzis Nicolás de UGARTE por informi pri la nova lingvo Esperanto? Nu, li aperigis la sciigon sur la revuo en la franca kaj en la hispana lingvoj, kurioze ne en Volapuko, same, post kelkaj numeroj li sciigis, ke li posedis la broŝuron eldonitan en la franca, presitan en Varsovio en la jaro 1887 kaj disvenditan de *Gebethner et Volff*, tio estas, iu havigis al Nicolás de UGARTE la unuan broŝuron eldonitan pri la lingvo Esperanto en la franca; ni memoru, ke Zamenhof ne publikigis ĝin en la hispana.

En la monato julio de 1889, Nicolás de UGARTE estis nomumita membro de la *Kadām Bevūnetik Volapūka*, la Akademio pri la lingvo Volapuko, kune kun alia hispano, la bilbaoa José María de ZUBIRÍA<sup>[9]</sup>. La unua ĉefa celo de la akademianoj estis proponi al p-ro SCHLEYER kelkajn ŝanĝojn en la lingvo, tamen la opinio de la aŭtoro, oficiale deklarita “inventinto de la lingvo” estis tute kontraŭa al ia ajn ŝanĝo. Do, la revuo *El Volapük* tiam pleniĝis je komentoj pri gramatiko, eblaj reformoj,



ĝin kvankam li neniam ŝanĝis siajn preferojn rilate al Volapuko, li skribis jenon:

*Tiene el esperanto vocales para nosotros más sencillas que el volapük... tiene el esperanto economía en la declinación y esto le ha proporcionado vocales sobrantes que emplea en terminaciones suaves. El volapük, sin declinación y empleadas las desinencias de esta en terminaciones que la suavicen, es precisamente el sistema que nosotros hace tiempo habíamos propuesto*<sup>[12]</sup>.

Verdire, Nicolás de UGARTE ne ŝanĝas sian opinion favoran al Volapük, kvankam ne la originala sed tiu modifita de la akademianoj kontraŭ la opinioj de SCHLEYER, tamen sur tiu longa studo de la lingvo de ZAMENHOF okulfrape aperas simpatiaj opinioj rilate la novan projekton. La artikolo daŭriĝas jene:

*La intransigencia y la infalibilidad de que se ha revestido Schleyer después del I Congreso de París, poniéndose abiertamente en frente de éste, da ventajas al esperanto, pero hasta ahora está aquel por encima de éste. Nos daremos por satisfechos con que de esta lucha nazca algo bueno y seguiremos impertérritos nuestro propósito es decir: abrazaremos lo mejor y más generalizado, y sobre todo desearemos que la humanidad dé un paso más en la senda del progreso. Sirva esto de contestación a cuantos nos hablan del esperanto como superior y sepan desde luego que no le perdemos de vista por si acaso, y así lo aconsejo a mis compatriotas pero sin pronunciarme en su favor*  
[13].

En la monato novembro de 1890 Nicolás de UGARTE forlasis la volapukan movadon pro la internaj problemoj inter SCHLEYER kaj la akademianoj. Sendube, lia lasta servo al la ideo pri utila help-lingvo kiu povus solvi la problemojn pri internacia komuniado, estis tiu ampleksa kaj analiza informo pri la nova lingvo elpensita de D-ro ZAMENHOF kaj tiuj informoj sendube alvenis al la legantoj de *El Volapük* kaj ĝenerale al la membroj de la Volapuka Asocio en Hispanio, kiuj verŝajne komprenis per la paĝoj de la revuo kaj de la informoj ricevita de Nicolás de UGARTE, ke la estonteco de Volapuko ne estis certigita kaj ke la nova lingvo Esperanto estus, eble, taŭga solvo. Krome, el la respondo havigita de Nicolás de UGARTE per sia artikolo al la legantoj de *El Volapük*, oni povas kompreni, ke kelkaj hispanaj volapukistoj jam preferis Esperanton.

---

<sup>7</sup> UGARTE, Nicolas de. 1888, *Proceso de la Lengua Universal*, Guadalajara: Tipografía y Encuadernación Provincial.

<sup>8</sup> Traduko de la hispanlingva teksto: “*Alia lingvo estas elpensita en Varsovio de la D-ro Zamenhof. Laŭ la aŭtoro, ĝi havas grandan avantaĝon rilate al Volapük: pro la fakto, ke ĝi povas esti bone komprenita de homoj kiuj antaŭe neniam lernis ĝin. Jen la traduko en la lingvo Esperanto de la unua versiklo de la Biblio: -la cetero en esperanto-*”.

<sup>9</sup> José María de ZUBIRIA, profesoro pri la angla lingvo en Bilbao kaj oficiala tradukisto. Li estis la aŭtoro de la libro *Gramática volapüka*, eldonita en la jaro 1887.

<sup>10</sup> Tiele: *SPERANTO*. Sur la artikolo menciita, Nicolas de Ugarte uzas same la vortojn *SPERANTO* kaj *ESPERANTO*. Krome, li mencias la aŭtoron de la lingvo kiel SAMENHOF aŭ ZAMENHOF.

<sup>11</sup> Edgar de Wahl, estono (1867-1948). Unue volapukisto, poste esperantisto. Li verkis en la jaro 1889 vortaron “*Esperanto-Hispana lingvo*”, bazita sur jam ekzistanta vortaro esperanto-rusa lingvo. En la jaro 1922 li kreis novan internacian lingvon “*Occidental*”.

Tiel, Joaquín de ARCE Y BODEGA fariĝis tiam esperantisto. Aliaj membroj de la estraro de la Volapuka Asocio, kiel Casto VILAR Y GARCÍA lernis Esperanton, li eĉ estis poste la profesoro de la unua kurso de Esperanto organizata en la andaluzia ĉefurbo en la jaro 1910. Rilate alia elstara volapukisto, José RODRÍGUEZ HUERTAS, sendube li sciis pri Esperanto per la volapuka revuo. Kvankam granadano (Guadix 1844), li estis estro de la lernejo *San Hermenegildo* en Malago kaj li ankaŭ sindediĉis al la eldonado de malgrandaj libroj, broŝurforme, kiuj povus esti utilaj por la baza lernado de diversaj sciencoj (matematiko, biologio, geografio, ktp.). En la jaro 1890 li decidis verki libro-metodon pri la nova lingvo Esperanto. Pri sia eksa volapuka agado kaj sia nova transiro al Esperanto li sciigis en la antaŭparolo jene:

*Mas como hemos tropezado, digámoslo así, con esta nueva lengua, de excelentes condiciones de sencillez y de más probabilidades de éxito que el Volapük, somos los primeros en arriar nuestra bandera para alistarnos resueltamente bajo la enseña que simboliza, conforme a nuestro humilde parecer, la más pronta y segurísima realización del progreso que tanto anhelamos*<sup>[14]</sup>.

Kaj kvankam ĉi tiu unua libro estis rifuzita de ZAMENHOF mem, pro la fakto, ke sur ĝi oni proponis kelkajn ŝanĝojn al la nova lingvo, ekz. forigo de la akuzativo, ŝanĝoj en la pluralo, ktp, estas necese aserti, ke RODRÍGUEZ HUERTAS informas pri tiuj ŝanĝoj ene de ĉapitro titolita “*Reformoj proponitaj de la amantoj de ĉi tiu lingvo loĝantaj en Malago*”, t.e. li admisias, ke la ŝanĝoj estas nur proponoj havigitaj al la aŭtoro de la lingvo por ebla konsidero kaj ne verdire la lingvo de la D-ro Zamenhof.

La ceteraj postaj aferoj jam estas sufiĉe konataj kaj facile troveblaj sur ĉiuj libroj eldonitaj rilate al la historio de la Esperanto-Movado en Hispanio. Do, estas tempo nun agnoski la laboron de tiuj volapukaj pra-esperantistoj kiuj ankaŭ en Hispanio diskonigis la ekziston de la nova lingvo kreita de D-ro ZAMENHOF kaj kies historio, feliĉe, daŭriĝas ĝis la kurantaj jaroj.

*José María Rodríguez Hernández  
Kordovo*

---

<sup>12</sup> Traduko de la hispanlingva teksto: “Esperanto havas vokalojn por ni pli facilaj ol volapük... esperanto ĝuas ekonomion rilate la deklinacion kaj tio favorigas la ekziston de plusaj vokaloj uzataj en mildaj vort-finaĵoj. La lingvo Volapük, sen deklinacioj kaj se uzataj la vokaloj por mildigi la vort-finaĵojn, estas ĝuste la sistemo de ni proponita antaŭlonge”.

<sup>13</sup> Traduko de la hispanlingva teksto: “La necedemon kaj la neerarivecon arogitaj al si de Schleyer post la 1-a Kongreso de Parizo, kaj sur tutklara fronta pozicio al tiu, favorigas la avantaĝon de esperanto, tamen ĝis nun tiu (Volapük) estas super ĉi tiu (Esperanto). Ni kontentiĝos se per tiu lukto naskiĝas io bona kaj ni daŭrigos brave nian celon, tio estas: ni adoptos tion plej bonan kaj pli disvastigitan, kaj ĉefe ni deziras, ke la homaro antaŭeniru en la vojon de la progreso. Ĉi tio utilu kiel respondo al tiuj kiuj parolas pri Esperanto kiel lingvo pli taŭga kaj sci, ke kompreneble ni ne perdos ĝin el la vido kaj tion mem mi konsilas al miaj kunlandanoj tamen sen ia prononco favore al ĝi (Esperanto)”.

<sup>14</sup> Traduko de la hispanlingva teksto: “Pro la fakto, ke ni renkontis, ni diru tiel, kun ĉi tiu nova lingvo, de eksterordinara facileco kaj kun pli probabla sukceso ol Volapük, ni estas la unuaj kiuj malhisos nian flagon kaj ni kuraĝe aliĝos al la nova standardo kiu simbolas, laŭ ni humile konsideras, la rapidan kaj tutcertan realigon de la progreso de ni tiom sopirata”.

## VERNE REVIZITATA KAJ REMALKOVRATA

La lasta romano de Jules Verne (tiu kie Esperanto estas plurfoje menciata) estas publikigita en aprilo de 2016... preskaŭ 111 jarojn post la morto de la aŭtoro. Eksterordinare, ĉu ne? Iel, Abel Montagut reskribis la romanon uzante la komenca manuskripton de Jules Verne kaj la postan laboron de ties filo Michel Verne sed respektante la spiriton kaj perspektivon de J. Verne. Oni diris, ke estas libro verkita je ses manoj:


*Tierranegra. El último viaje extraordinario*  
Jules Verne, Michel Verne, Abel Montagut.  
Paganel, 2016. 240 p.

La libro (hispanlingve) enhavas la komplet(igit)an romanon de Verne kun enkonduko kaj tri aldonaj suplementoj (1: J. Verne kaj Esperanto. 2: Fragmentoj de “Vojaĝstudo”. 3: Notoj pri la reversado).

Abel Montagut (Llardecans, 1953), elstara verkisto kaj esperantisto, estas membro de Societoj Jules Verne franca, kataluna kaj hispana. Li verkis tre interesajn artikolojn pri Verne kaj Esperanto (aperintaj en “Libera Folio”), precipe rilate al la lasta romano de Verne. La historio de la verkado, pretigado kaj publikigo de tiu romano estis vera aventuro.

Jules Verne komencis serion de romanoj konataj kiel “La Eksterordinaraj Vojaĝoj” per *Kvin semajnoj en balono* en 1863 kaj la lasta estis tiu ekverkita en 1903, komence titolita *Voyage d'études* (“Vojaĝstudo” aŭ “Esplorvojaĝo”). Ambaŭ okazis en la nigra Afriko.

En 1903 J. Verne komencis verki tiun romanon. Sed li haltis la redaktadon pro ne klaraj cirkonstancoj. Tial, la romano restis nefinita kiam mortis la aŭtoro en 1905.



Poste, lia filo, Michel Verne prenis la manuskripton kaj pretigis publikigon sed modifante diversajn aferojn (ekzemple, ve! li malaperigis la menciojn de Esperanto) kaj aldonante ĉapitrojn. Tiu romano aperis en 1914 sub la titolo *Le dernière voyage extraordinaire. Étonnante aventure de la mission Barsac*.

La komenca manuskripto restis nekonata de la publiko dum multaj jaroj. Fine, ĝi estis publikigita en 1993. Kompreneble tio kaptis la atenton de esperantistoj, Ankaŭ ĝi estis publikigita en esperanta traduko fare de István Ertl.

Jules Verne iĝis tiom fama, ke tia famo (filmoj, interpretoj, versioj) iel kaŝis la veran Verne. Ekzemple, multaj homoj pensas ke en la romano *Ĉirkaŭ la mondo dum 80 tagoj* aperas veturado per balono sed fakte tio ne aperas en la romano.

Jules Verne interesiĝis favore pri Esperanto. Estas konata foto kie li aperas kun esperanta revuo. Li akceptis la honoran prezidantecon de la E-Grupo de Amiens, fondita en 1903, kaj li promesis verki romanon pritraktante la temon de la lingvo Esperanto.

Eble li ne studis la idiomon sed probable li konis iomete ĝian strukturon kaj celon. Oni povas konsideri ke la ideoj aperintaj en tiu romano estis iom pli ol propagandaj frazoj kaj prezentas lian opiniön:

*“Esperanto estas simpla, fleksebla, harmonia lingvo, kiu taŭgas same por eleganta prozo kiel por harmoniaj versoj. Ĝi kapablas esprimi ĉiujn pensojn kaj eĉ la plej fajnajn sentojn de la animo... Ĝi estas la ideala internacia lingvo”.*

Lorenzo Noguero

## **EKSTERAJ RILATOJ DE UEA KAJ CELARO POR DAŬRIPOVA EVOLUIGO**

Se ni opinias ke Universala Esperanto Asocio (UEA) estas vera kupolo de nia movado, ni estos konsciaj pri la gravaj taskoj kiuj UEA devas plenumi. Inter ili troviĝas kelkaj malpli konataj de simpla esperantisto, nome, la eksteraj rilatoj, kiuj estas tre valoraj por la disvastigo de Esperanto en la internacia sfero kaj ankaŭ pro la fakto ke nia movado povas esti utila al tiuj internaciaj institucioj por diskonigi iliajn celojn.

Vere UEA ludas gravan rolon per siaj eksteraj rilatoj almenaŭ ĉe tri gravaj internaciaj organizoj: Unuiĝintaj Nacioj (UN), UNESKO, kaj Eŭropa Konsilio, kun kiuj havas konsultajn rilatojn, kaj pri tio vi povas legi ofte en la revuo *Esperanto* kaj aliaj eldonaĵoj. Por esperantistoj la rilatoj kun UNESKO estas pli konataj danke al la Rezolucio de Montevideo pri Esperanto de 1954, kaj postaj agnoskoj de la kultura valoro de Esperanto, sed eble estas malpli konata la laboro de UEA ĉe Unuiĝintaj Nacioj. Tamen, malgraŭ niaj malgrandaj rimedoj, tie laboras pro Esperanto aro da homoj ene de la sidejoj de UN en Novjorko kaj en Ĝenevo, kaj ili partoprenas multajn forumojn, kiel Ne Registara Organizo (NRO) en la sino de la Ekonomia kaj Socia Konsilio de UN, la t.n. Ekosok, kiu estas unu el la organoj de UN.

De la 25-a ĝis la 27-a de septembro de 2015, pli ol 180 ŝtatrezentantoj partoprenis en la sidejo de UN en Novjorko *Pintkonsidon pri Daŭripova Evoluigo* por la venontaj dekvin jaroj, do, kun celoj validaj ĝis 2030. Ili estas daŭrigo de la *Jarmilaj Evoluigaj Celoj* kiujn oni lanĉis en la jaro 2000 kaj kiuj validis ĝis 2015.



Antaŭ ol studi pli detale la 17 celojn, ni notu ke la koncepto “Daŭripova evoluigo”, proponita en la Raporto Brundtland, ĉe Unuiĝintaj Nacioj en 1987 tekstas jene “ Daŭripova evoluigo estas tiu kiu plenumas la nunajn bezonojn de la homaro, sen limigi la eblojn de la estontaj generacioj plenumi la siajn”.

Fronte al la urĝeco de la ekologia kaj socia krizo kiu manifestiĝas mondscale (klimatsanĝiĝo, elĉerpiĝo de krudaj materialoj, nutra malsekureco, senarbarigo, perdo de biodiverseco, kresko de tutmonda loĝantaro, naturaj kaj industriaj katastrofoj ktp, daŭripova evoluigo estas respondeco de ĉiu aganto en internacia kadro.

## Celoj por daŭripova evoluigo

La programo konsistas el 17 ĉefceloj, kiuj estas jenaj:

*1.- Forigi malriĉon ĉie, en ĉiuj ĝiaj formoj.*

Por tiu celo oni devas garantii la justan aliron al ekonomiaj, kaj teknologiaj rimedoj kaj krei socian protektadon por la plej malriĉaj homoj.

*2.- Forigi malsaton, atingi manĝosekurecon kaj pli bonan nutrandon, kaj antaŭenigi daŭripovan agrikulturon.*

Temas pri la ebleco havi bonan nutrandon por ĉiuj, certigante la daŭripovecon kaj agrikulturan produktadon, interalie per helpo al la malgrandaj agrikulturistoj, kaj iliaj infrastrukturoj.

*3.- Garantii sanajn vivojn kaj kreskigi bonfarthon por ĉiuj homoj en ĉiuj aĝoj.*

Oni klopodos redukti la patrinan kaj infanajn mortoftecon per sistema prevento de malsanoj kaj per taŭgaj sanitariaj servoj. Por plenumi tiun celon gravas investi por la koncerna esplorado .

*4.- Garantii inkluzivan kaj egalecan bonkvalitan edukadon kaj plivastigi por ĉiuj la ŝancojn por tutviva lernado.*

Por garantii tion ĉi, ĉiuj infanoj devas fini la elementan kaj duan ciklon, kaj necesas plibonigi la superajn kaj teknikan edukadon por atingi plej bonajn laborpostenojn. Ĉiuj strukturoj kaj lernejoj devas esti pretaj por akcepti homojn kiuj troviĝas en pli malfavoraj situacioj (virinoj, indiĝenoj, handicapuloj ktp).



*5.- Atingi egalecon inter la seksoj kaj plivastigi la decidopovon de ĉiuj virinoj kaj junulinoj.*

Do, elimini ĉian diskriminacion, perforton, kaj ĉian ekspluatadon.

*6.- Garantii al ĉiuj homoj haveblon kaj daŭripovan mastumadon de akvo kaj sanitariaj sistemoj.*

Temas pri urĝa bezono je universala aliro al trinkebla akvo, reduktado de la poluado kaj kaj certigo de bonaj sanitariaj servoj.

*7.- Garantii al ĉiuj homoj alireblon al pagebla, fidinda, daŭripova kaj moderna energio.*

Necesas faciligi la modernajn renovigeblajn energiojn ene de aro de energifontoj, kaj krei aliron al esplorado kaj al nepoluaj teknologioj en ĉiu lando, precipe en la malpli evoluintaj.

*8.- Antaŭenigi daŭran, inkluzivan kaj daŭripovan ekonomian kreskon, plenan kaj produktivan dungitecon, kaj bonkondiĉan laboron por ĉiuj homoj.*

Oni devas antaŭenigi novajn politikojn pri daŭripova evoluigo, celantajn sekuran dungitecon kaj garantii laborrajton por ĉiuj.

*9.- Konstrui elteneman infrastrukturon, akceli inkluzivan kaj daŭripovan industriigon kaj kultivi inventemon.*

Oni klopodos pliigi la sciencan esploron kaj plibonigi la teknologian kapablon de la industriaj sektoroj de ĉiu lando, ĉefe la malpli evoluintaj, per instigo de inventemo kaj daŭripoveco.

*10.- Redukti malegalecon ene de landoj kaj inter landoj.*

Por tiu celo oni devos stimuli la socian, ekonomian kaj politikan inkludon de la tuta loĝantaro ene de landoj, per fiskaj, salajraj kaj sociaj leĝoj cele al progresiva atingo de plej granda egaleco.

*11.- Igi urbojn kaj homajn loĝejarojn inkluzivaj, sekuraj, eltenemaj kaj daŭripovaj.*

Por tiu celo, oni devas certigi la aliron al loĝejoj kaj taŭgaj bazaj servoj, sekuraj kaj elteneblaj por ĉiuj, per inkluziva planado de urboj.

*12.- Garantii daŭripovajn formojn de konsumado kaj produktado.*

Necesas uzi efike la naturrimedojn ŝirmante la medion kontraŭ ĉia nocado. Ankaŭ necesas antaŭenigi la daŭripovan edukadon kaj turismon, kaj bone informi la tutmondajn konsumantojn.

*13.- Urĝe agi por kontraŭbatali klimatsanĝiĝon kaj ties efikojn (konforme al la Kadra Konvencio de Unuiĝintaj Nacioj pri Klimatsanĝiĝo).*

La klimatsanĝiĝo estas nuntempa grava realaĵo kiun ĉiu lando devas kontraŭbatali, laŭ la internaciaj traktatoj de Unuiĝintaj Nacioj.

*14.- Konservi kaj daŭripove utiligi la oceanojn, marojn, kaj marajn rimedojn cele al daŭripova evoluigo.*

Por tiu celo, oni devas eviti kaj redukti la maran poluadon, per protektado de la maraj ekosistemoj, forigante la neleĝan kaj troan fiŝkaptadon por atingi daŭripovan evoluadon. Bezonataj estas pliaj esploroj por plibonigi la sciencajn konojn cele al konservado de la oceanoj kaj ilia biodiverseco.

*15.- Protekti, restarigi kaj disvastigi daŭripovan uzadon de teraj ekosistemoj, daŭripove mastrumi arbarojn, kontraŭbatali dezertiĝon, haltigi kaj inversigi la degeneradon de grundoj kaj haltigi la perdiĝon de biodiverseco.*

Urĝas apliki la leĝojn kaj internaciajn traktatojn por konservi la tutmondajn ekosistemojn, per malpliigo de la media degenerado, kaj per la konservado de arbaro kaj de biodiverseco.

*16.- Antaŭenigi la konstruadon de pacaj kaj inkluzivaj socioj por daŭripova evoluigo, garantii aliron al justico por ĉiuj homoj, kaj starigi efikajn, respondecajn kaj inkluzivajn instituciojn je ĉiuj niveloj.*

Necesas elimini ĉiun perforton kaj ekspluatadon en la mondo, per naciaj kaj internaciaj leĝoj, per plifortigo de la naciaj institucioj tiucele, kaj kontraŭ deliktado kaj terorismo.

## 17.- Plifortigi la realigajn kapablojn kaj revigligi la tutmondan partnerecon por daŭripova evoluigo.

Tiu ĉi fina celo kovras kvin punktojn: *Financoj*, (plifortigo de la internaj rimedoj kaj internacia helpo al evoluantaj landoj); *Teknologio*: plifortigi la regionan kaj internacian kunlaboron Nor-dan-Sudan, kaj Sudan-Sudan, rilate al la teknologio kaj ĝia aliro; *Realigaj kapabloj* : pliigi la internacian apogon al programoj por la instigado de realigaj kapabloj precipe en la evoluantaj landoj; *Komerco*: Antaŭenigi sistemon de universala multflanka komerco, malfermita, nediskriminacia kaj justa, ne forgesante eksportadon al la evoluantaj landoj; kaj fina punkto, kiun oni povus nomi *Aliaj gravaj temoj*: ekzemple, kohero de normoj kaj institucioj, formado de aliancoj, kolektado de datumoj ktp. cele al tutmonda alianco por daŭripova evoluigo, kiuj apogu la kapablojn de la evoluantaj landoj.

Tiuj CDE ne estas devigaj, ĉar la teksto ne estas traktato, do, la plenumado de tiuj ĉi celoj estos libervola por ĉiuj landoj, kiuj elektu la plej taŭgajn rimedojn por plenumi ilin.

Lingvo kaj kulturo

Fine, sed ne malpli grave, ni notu, post studo de la enhavo de la 17 ĉefceloj por daŭripova evoluigo, ke oni neglektis la gravecon de lingva diskriminacio. Pluraj deklaroj de UNESKO klare agnoskas ke ni devas konservi lingvan diversecon kaj eviti lingvan diskriminacion, ĉar la lingvo estas instrumento de kultura heredaĵo. Ofte la naciaj registaroj emas konsideri la grandan lingvan diversecon, kiel baron por komunikado kaj evoluigo. Tamen, kiel agnoskas la *Manifesto de Prago por la Internacia Lingvo Esperanto*, de 1996, la lingva diverseco estas konstanta kaj nemalhavebla fonto de riĉeco. Do, ĉiu lingvo, kiel ĉiu vivestaĵo, estas valora por si mem kaj inda je protektado kaj subtenado.

La kultura diverseco estas “komuna heredaĵo de la homaro” kaj devas esti plifirmigita favore al la nunaj kaj estontaj generacioj. Ĝia defendo estas etika ordono nedisigebla de la respekto al digno de la homo, ĉar la kulturaj rajtoj estas kerna parto de la homaj rajtoj, kiuj estas universalaj kaj nedisigeblaj.

Laŭ la Manifesto de Prago, “ni asertas ke lingva malegaleco sekvigas komunikan malegalecon je ĉiuj niveloj, inkluzive de la internacia nivelo”. kaj “ni asertas ke la politiko de komunikado kaj evoluigo, se ĝi ne estas bazita sur respekto al kaj subteno de ĉiuj lingvoj, kondamnas al formorto la plimulton de la lingvoj de la mondo”.

Vere, la kultura diverseco estas nenies propraĵo, ĝi apartenas al la tuta homaro.

Atingi egalecon kaj pacon por la venontaj 15 jaroj estas eble, se ni kolektive mobilizos politikan volon, la necesajn rimedojn kaj samtempe ni kune laboros por la atingo de media kaj monda daŭripovo.

Kiel skribas D-ro H. Tonkin en la revuo Esperanto, “gravas ke la esperantistoj ĝenerale, atentu pri la Celoj kaj faru sian eblon kunlabori kun tiuj kiuj klopodas realigi ilin. Levu la demandon kun viaj retaj kontaktuloj, en via loka grupo, en la jarkunveno de via landa asocio, en via faka asocio kaj ellaboru kaj realigu simplan planon por kunhelpi”.

Atingi egalecon kaj pacon por la venontaj 15 jaroj estas eble, se ni kolektive mobilizas politikan volon, la necesajn rimedojn kaj samtempe ni kune laboras por la atingo de media kaj monda daŭripovo.

M. Rafaela Urueña Honora Prezidanto de Esperanto por UN

# HISPANA KRITIKA POEZIO EN ESPERANTO

## (ALVOKE AL LA HISPANA ESPERANTISTARO)

La hispana poeto Jorge Maíz, kvankam li ankoraŭ ne eklernis Esperanton, sentas apartan korinklinon al nia afero. Jam en januaro 2014, li sin turnis al komuna amiko de ni ambaŭ, Alfredo González, petante lin serĉi esperantiganton por unu el liaj poemoj. Apenaŭ nia amiko informis min prie, mi plej volonte transprenis la taskon. Tri monatojn poste, mi ricevis el Jorge Maíz kelkajn ekzemplerojn de lia poemaro *Hirsutos y maleantes* [Bruskuloj kaj deliktuloj]. Temas pri brava elmonro de nuntempa engaĝiginta poezio en la hispana lingvo, kun kvar esceptoj: du poemoj aperas en la kataluna, unu en la eŭska kaj unu en Esperanto (ĝuste tiu, kiun pli frue mi tradukis) kun eksplicita dediĉo “al Alfredo, Miguel kaj ĉiuj esperantistoj”. Nelonge poste mi esperantigis kvar poemojn el tiu kolekto kaj prezentis ilin kaj ties aŭtoron en *Sennaciulo*, n-ro 7-8 (1309-1310) Julio-Aŭgusto 2014.

De tiam, miaj kontaktoj kun Jorge Maíz fariĝis ĉiam pli oftaj kaj sukaj. Pasintsomere li retmesaĝis al mi plej interesan proponon. Ekzistas hispanlingva antologio de nuntempa hispana kritika poezio, en kompilo far la renoma juna poeto kaj doktoro pri hispana filologio Alberto García-Teresa, pleja aŭtoritato pri tiu temo. En ĝi, legeblas entute 60 poemoj (po tri el ĉiu aŭtoro) de la 20 poetoj tiutere plej elstaraj kaj famaj en Hispanio. Oni intencis fari svedan version de la antologio, kaj Maíz ekpensis, ke eble interesus nin membrojn de SATeH (SAT en Hispanio) realigi esperantan version.

Miaflanke, kompreneble, ke mi interesiĝis. Apenaŭ mi ricevis la originalon, mi ensorbis ties enhavon kaj tuj poste komencis esperantigi unu poemon post la alia. Temas pri vera juvelo de nuntempa engaĝiginta poezio. Esperante, ĝi havas la titolon *Nova mondo en niaj koroj*. La subtitolo, *Elmonro el nuntempaj hispanaj kritikaj poetoj*, precizigas la enhavon.


Sed la propono de Maíz prezentiĝis ankoraŭ pli vasta kaj mirinda. Li esprimis al SATeH sian pretecon okupiĝi mem pri la kompostado de la esperantigita antologio kaj pri ties publikigo ĉe la neesperanta eldonejo *Calúmnia*, de Majoroko. Kaj jen plia mirindaĵo: per ĉi verko, *Calúmnia* iniciatos, se ni akceptos, kolekton dediĉotan al publikigo de esperantlingva literaturo.

Ĉu ni povintus ne akcepti? Ĉu ni rajtintus fordormi la okazon? Ni jesis entuziasme kaj dankoplene. Petite pri elpenso de titolo por la kolekto, ni akceptis belan kaj trafan proponon far mia kolego kaj amiko la E-verkisto Jorge Camacho: “revo lucida”.

Unu el la novaĵoj en ĉi kolektiva verko estas la fakto, ke oni aldonis appendice poemojn de tri hispanaj poetoj (Suso Moinhos, Jorge Camacho kaj mi mem), kiuj, por pripoemi sian socian kritikon, elektis ne la hispanan, sed la internacian lingvon. Kaj tio lokas niajn E-poetojn samnivele kun la nacilingvaj kolegoj kaj markas la komencon de interesplena kunlaboro inter unuj kaj la aliaj. Fakte, antaŭ nelonge, ni, ĉiuj kontestemaj poetoj de Esperantujo, estis invititaj de García-Teresa al partopreno en grava engaĝiginta poezia revuo, kie niaj poemoj aperos dulingve (esperante-hispane).

La pasintan 29an de januaro, vidis la lumon *Nova mondo en niaj koroj (Elmonro el nuntempaj hispanaj kritikaj poetoj)*, kompilita de Alberto García-Teresa kaj tradukita kaj komentita de Miguel Fernández. Ĝi aperis kiel la unua numero de la nova –kiom da novaĵoj!– esperanta kolekto “revo lucida”, de la baleara eldonejo *Calúmnia*, kiu, krome, invitis SATeH-on aperi kiel kuneldoninto.





Nun estas la vico de ni esperantistoj. Espereble, nia reago staros je la alto de la faktoj. Pro la malavara entuziasmo de tiu neesperanta –kvankam evidente esperantama– eldonejo al nia afero, ĝi meritis ricevi apartajn atenton kaj dankon el ni kiel legantoj. Kiel la solaj eblaj legantoj! Akirante ekzemplerojn de ĉi verko, ni certe ne nur havigas al ni beletraĵon traĝuindan kaj altkvalitan, sed ankaŭ ebligas la apiron de novaj same allogaj E-verkoj kaj pruvas al la kultura mondo ekster Esperantujo, ke ni esperantistoj vere ekzistas.

La libro, 204-paĝa kaj en la formato 18x13 cm, mendeblas ĉe la libroservo de SATeH [libroservo@gmail.com] kontraŭ 7,50 €. Ĉi tio evidentigas, ke el ĉi entrepreno la eldonistoj ja ne celas enspezi monon. Ja ili konscias, ke, plej probable, okazos la malo. Sed tio al ili ne gravas. Nur granda simpatio al nia afero instigas ilin kondukti tiel. Ni reciproku ilian konduton.

Jen la prologo, per kiu en la libro mi enkuntekstigas la kreaĵojn de la priantologiitaj hispanaj E-poetoj:

### Prologo de Miguel Fernández

Inter la engaĝintaj hispanaj poetoj, kiuj elektis pripoemi i.a. sian denuncon pri la socia maljusto kaj sian pledon por la rajtoj de la popolo, troviĝas grupo el ili, kiu, plie, elektis fari tion en la internacia lingvo. Malgraŭ ke por la hispana ĝenerala publiko la ekzisto de ĉi lastaj poetoj nesuspektatas aŭ, en la plej bona okazo, ignoratas, dum ili rigardatas stranguloj de la plej bela akvo, tiuj poetoj vivas, batalas kaj kreas samcele kiel la kolegoj verkantaj nacilingve. Aliflanke, iliaj kreaĵoj adresatas al legantaro senkompare malpli granda, kvankam certe pli diversa ol la hispanlingvaj poemoj de la kolegoj. Sen la neceso de tradukoj, iliaj poemoj rekte trafas poeziemulojn de landoj ne nur hispanlingvaj, sed el la kvin kontinentoj. E-poetoj scias, ke iliaj versoj povas esti legataj de homoj tiel de Madrido kiel de Melburno, de Antananarivo, de Helsinko, de Tokio, de Nov-Jorko... Do iliaj lirikaj protestoj kaj pledoj fariĝas tuj internaciaj. Kaj eble tiu internacieco de ilia voĉo grande kaj spiritkarese kompensas al ili ties ĝeneralan nevideblon.

Ĉi-libre, verŝajne por la unua fojo en la historio de Esperanto, oni prezentas al la publiko la esperantigon de nacilingva antologio de difinita tipo de nuntempa poezio apendice aldonante al la kompilitaj poemoj originale esperantajn kontribuojn de E-poetoj al komuna temo. Ni koncernatoj: Suso Moinhos, Jorge Camacho kaj mi mem, dankas la kompilinton Alberto García-Teresa pro ties entuziasma apogo al tiu ideo, kio honoras nin kaj Esperantujojn.

*Miguel Fernández*

